

BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO-ISTITUTO
N-ro 70 Aprilo 2007

Esperanto estu la unue lernenda, fremda lingvo kaj kapabloevoluiga lernobjekto en la bazgradaj lernejoj.

Proverbo: Al la bona cxevalo donu pli da furagxo

Estraro: Doc. Vasil Pistoli, Bardhyl Selimi, Rita Permeti

Retadreso de niaj membroj kaj simpatiantoj:

a_myrazi@yahoo.com,
adoci@gmx.de,
agimperaj@yahoo.it,
anila.sokoli@raiffeisen.al,
apistoli@aol.com,
arbibasho@yahoo.it,
beqirajs@hotmail.com,
bselimi@gmail.com,
cara.e@markdist.com,
donika.kapollari@rt-grp.com,
donika.kapollari@yahoo.com
dritanxhindole@hotmail.com,
egli_b@wp.pl,
eltonzaimi78@yahoo.com,
enkelaxhamaj@yahoo.com,
ereid@wp.pl,
ervincanga@yahoo.com,
fiorialbtours@yahoo.com,
gentianymeri@yahoo.com,
hysaerald@yahoo.it,
klotirama@hotmail.com,
klotirama@yahoo.com,
lorushi_1986@yahoo.com,
matildasokoli@yahoo.com,
mgumeni@lincoln.org.al,
mimoza.blomberg@apoteket.se,
mirela_biba@hotmail.com,
motto@bwc.org,
n_limaj@yahoo.com,
ne_sokoli@yahoo.com,
nesokoli@hotmail.com,
notemarius@yahoo.com,
pistolia@yahoo.com,
sambeg2000@yahoo.com,

selimibardhyl@yahoo.com,
sh.ha@hotmail.com,
shabanhasani@gmail.com,
tcobani@yahoo.com,
uliambinozi@yahoo.co.uk,
worldofleda@yahoo.com,

Enhavo

Ni kaj UEA

Nova numero de la Revuo Esperanto

Nova reta libro de UEA

Ni kaj ILEI

Nova numero de la Revuo IPR

Programo Lingvolancxilo

Letero el Hungario

El la leteroj

Letero de s-ino Elda Doerfler

El la bultenoj de amikaj asocioj

Plej grandaj genocidistoj

Propagando

Esperanto radio kaj Televizio

La preso kaj medio pri albanoj kaj Albanio

Nova sxtato en Euxropo

Rakontoj

Ni kaj UEA

Alvoko ripetita de s-ro Renato Corsetti al la albanaj esperantistoj

Të dashur esperantistë shqiptarë,

Që disa vjet, zoti Renato Corsetti, kryetar i shoqatës universale esperantiste UEA ka hapur një faqe në internet per esperantiset shqiptarë. Mjerisht, ndonëse kemi njoftuar edhe më parë, shumë pak prej nesh janë regjistruar në të. Kjo e zhgënjën jo vetëm zotin Renato që paguan për këtë faqe por të gjithëve ne. Nuk është e vështirë të regjistroheni në atë faqe, ku mund të gjeni materiale të ndryshme të seksioit tonë dhe nga ku mund t'u vinë direkt në adresën tuaj elektronike materiale të ndryshme.

Ju ftoj të regjistroheni sa më parë. Hapni,

<http://groups.yahoo.com/group/albanaj-esperantistoj/>

<http://groups.yahoo.com/group/albanaj-esperantistoj/manage>

ndiqni udhëzimet që jepen aty për t'u regjistruar.

Paskëtaj ju mund të dërgoni materiale tuaja në adresën albanajesperantistoj@yahoogropus.com . Provojeni!

Faleminderit,
Bardhyli

Reta Jarlibro <reto@uea.org>

Estimataj membroj-abonantoj de UEA,

En la retejo [UEA.ORG](http://uea.org) jam estas elshutebla la PDF-versio de la marta numero de la revuo Esperanto.

La enhavlisto de la nova numero:

- * Malferme: Lanchita la lingvolanchilo (Paul Gubbins).
- * Kongresa temo: „Okcidento en oriento: akcepto kaj rezisto“ (Usui Hiroyuki).
- * La Komuna Europa Referenckadro (Renato Corsetti).
- * Kalendaro 2007 – 2008.
- * Libroservo de UEA: Boris Kolker venkis denove (Osmo Buller).
- * Recenzoj:
 - Jorge Camacho pri Chiuj dioj estas for. Novjorkaj poemoj.
 - La angulo de EVA: Martin Strümpfel: Autuno.
 - Katalin Kováts pri Esperanto priamou metódu; Esperanto per rekta metodo; Instruaj bildoj por rektmetoda instruado (500 folioj); Instruaj bildoj por rektmetoda instruado (KD); Audo-vida konversacia kurso de Esperanto por progresintoj (DVD).
 - Kelkaj pliaj al „Mil unuaj vortoj“ (Edmund Grimley Evans).
- * Laste aperis.
- * Loke-Fake-Persone: Israelo. Chehio. Kroatio. Pola Radio. Slovakio. Radio Aktiva. Oratora Konkurso en Jokohamo.
- * Oficiala Informilo.
- * Kongresa statistiko.
- * La Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK).
- * Tra la mondo:
 - Sukcesa eksperimento en rusa lernejo (Bronislav Chupin).
 - Nigherianoj kongresis (Ahmed S.A. kaj Moses Opa G.).
 - Chu la lasta kurso en chehha universitato? (Josef Vojáček).
- * Forpaso.
- * Anoncetoj.

Por elshuti la numeron bonvolu viziti retpaghon <http://reto.uea.org> (unuafoliaj uzantoj bezonas registriĝi).

La marta PDF-versio de la revuo Esperanto estas trovebla sub la menuero TEKŬ - kune kun pluraj antaŭaj numeroj. Junaj membroj trovos tie ankaŭ PDF-versiojn de revuoj TEJO-tutmonde kaj Kontakto.

*** Pardonpeton, se la informo vin ne interesas. Bonvolu sciigi al reto@uea.org se vi ne plu deziras ricevi sciigojn pri la PDF-versio.

Amike,
Andrej Grigorjevskij,
volontula prizorganto de [UEA.ORG](http://uea.org)

Estimataj membroj-abonantoj de UEA,

En la retejo [UEA.ORG](http://uea.org) jam estas elshutebla la PDF-versio de la aprila numero de la revuo Esperanto.

Por elshuti la numeron bonvolu viziti retpaghon <http://reto.uea.org> (unuafojaj venintoj bezonas registrighi).

La enhavlisto de la aprila numero:

- * Malferme: Novaj vizaghoj de Rondo Familia (Amri Wandel).
 - * Ek al VE(L)K? Esperantio – kion ghi donis al mi kaj kion ghi prenis? (Aleksander Melnikov).
 - * La nomoj de la familianoj de Zamenhof aldonighis al la listo de Jad Vashem (Josef Shemer).
 - * Kongresa Komuniko 3.
 - * La membraro de UEA en 2006.
 - * Letero al Margot: Esperanto post la angla (Claude Piron).
 - * Kvin komitatanoj B rekte elektitaj.
 - * Dedichi tankaojn al Utafesto en „Bonvenon al Oomoto en 2007“.
- Beletra Almanako. La junia Malferma Tago.
- * Grava tasko por plia rekono al nia movado (Ileana Schrøder).
 - * Vojoj al la Homa Digno (Renée Triolle).
 - * Recenzoj: Ziko van Dijk pri Vivo de Andreo Cseh.
 - * Jorge Camacho pri Trilingva landlim'. Baldur Ragnarsson pri Pli lume la mallumo zumas... Stilfiguroj en la poezio de esperanto.
 - * La angulo de EVA: Martin Ljubin: Fabriko.
 - * Laste aperis.
 - * Loke-Fake: Nederlando (Atilio Orellana Rojas). Germanio.
- Esperantologia konferenco en Jokohamo. Konkurso pri jubilea simbolo.
- * Kvina Nitobe-Simpozio okazos en Tokio. Oficiala informilo.
 - * Tra la mondo: Internacia Libro-Foiro en Jerusalemo (Amri Wandel).
 - * Interlingvistika sesio en nova loko (Ilona Koutny). Fervojistoj fervore skiis en Rumanio (Aurora Bute).
 - * Forpasoj. Migrante.

La aprila PDF-versio de la revuo Esperanto estas trovebla sub la menuero TEK0

- kune kun pluraj antaŭaj numeroj. Junaj membroj trovas tie ankaŭ PDF-versiojn de revuoj TEJO-tutmonde kaj Kontakto.

*** Pardonpeton, se la informo vin ne interesas. Bonvolu sciigi al reto@uea.org se vi ne plu deziras ricevi sciigojn pri la PDF-versio.

Amike,
Andrej Grigorjevskij,
volontula prizorganto de UEA.ORG

NI kaj ILEI kaj AIS

Re: binozi studento (al)

Estimata bakalauro Binozi,

Por prezenti vin al magistra ekzameno vi bezonas 90 "administrajn" studunuojn.

Lau miaj informoj vi kolektis (krom tiuj necesaj por la bakalaura ekzameno) 30 studunuojn.

Bedaurinde mi ne ricevis informojn pri studunuoj akiritaj dum la studjaro 2006/07, do povas esti, ke vi havas iomete pli, sed verŝajne ne 60.

Bv. mem kontroli - mi metis vian studaddosieron al:

<http://w3.forst.tu-muenchen.de/~quednau/binozi>

La kursoj signitaj per "B" estas foruzitaj por via bakalaura ekzameno, tiuj kun "X" estas validaj por la magistra ekzameno.

Vi povas fari magistran ekzamenon nur dum SUS, kaj SUS estas chi-jare planita nur en San Marino, komence de septembro.

(Chifoje kandidatoj el orienta Europo ricevos en San Marino 75%-an rabaton)

Kun afablaj salutoj

Prof. Dr. H.D.Quednau Technische Universitaet Muenchen
Am Hochanger 13 Forstwissenschaftliche Fakultae
DE-85354 Freising Forstliche Biometrie und Informatik
Tel: +49 8161 71-4765
Fax: +49 8161 71-4767

email: quednau@esperanto-muenchen.de

url: <http://www.forst.wzw.tum.de/~quednau>

Lingvolanchilo] Elsxuteblaj ekzamenspecimenoj

Saluton,

Mi sxatus atentigi vin pri valora kolekto de ekzamenaj specimenoj, kiuj troveblas en la pagxaro www.edukado.net.

En la sekcio [Landaj Ekzamenoj](#) ni prezentas diverslandajn naciajn Esperranto-ekzamensistemojn.

Aparta gxojjo estas nun informi vin pri tio, ke ni sukcesis enretigi la specimenojn de la hungariaj sxtataj lingvoekzamenoj.

Sercxu la apartan subcxapitron [Hungario - ŝtata ekzamensistemo \(15\)](#), kie legeblas enkonduka studo pri la ekzamenoj mem, ligo al la ekzamenpriskriboj cxe la pagxaro de la lingvocentro (ITK) kaj deko da ellaboritaj ekzamenspecimenoj en PDF-formato.

La kolekto celas plifaciligi la orietigxon pri la ekzamenaj postuloj kaj helpi la preparlaboron de la hungaraj kandidatoj kaj iliaj instruistoj.

En la sama pagxo, cxe alia subcxapitro [Hungario - abiturienta ekzamensistemo \(18\)](#) troveblas ankaux alia ricxa kolekto kun 18 dokumentoj, el kiuj vi povas ekkoni la postularon de la oficiala abiturienta ekzamensistemo, en kiu egalrange kun aliaj vivaj fremdaj lingvoj funkcias ankaux Esperanto.

Nin aparte gxojigas ne nur la modela subteno kaj kunlaboro de la hungaraj koleginoj Pálma Csiszár kaj Márta Kovács, sed ankaux la ricxeco kaj alta kvalito, serioza organiziteco de la Esperanto-ekzamenoj en Hungario.

Ni dauxre klopodas akiri specimenojn de aliaj landoj, kaj sukcesis jam rilate al **Britio, Italio, Rusio kaj Usono**.

Esperable la hungara modelo instigos al kunlaboro kelkajn asociojn, kiuj funkciigas ekzamensistemon, sed gxis nun ne emis kunlabori.

Kontribuojn, pliaj informojn bonvolu sendi al redaktanto@edukado.net. Dankon.

Amike salutas vin: Katalin Kovats, redaktoro



Dr. Katalin KOVATS, lingvoinstruisto, redaktoro

Spaarwaterstraat 74 - 2593 RP - Den Haag - Nederlando

Retposxto: katalin.kovats@orange.nl

Vizitu: <http://www.edukado.net> la servon de Esperanto-instruistoj

Kaj sercxu Esperanton ankaux cxi tie: <http://www.vggallery.com/index.html>

Esperanto en rekta metodo

Saluton, Ni jam pli frue informis vin pri la novaj rektmetodaj lerniloj de Stano Marček, kiuj krom la Esperanto-versio pretighas en pluraj lingvoj. Danke al la aŭtoro nun estas elshutebla che [edukado.net](http://www.edukado.net) la tuta slovaka versio de la lernilo **[Esperanto per rekta metodo](#)**.

Perde de tiu ĉi elshutajho la interesatoj povas vidi la lernilon kaj imagi kiel aspektos aŭ kiel povas aspekti eventuala alilingva traduko de la libro, por kiu la aŭtoro serĉas pliajn kunlaborantojn. Informoj pri la slovaka versio kaj ĝhia elshuto troveblas en la katalogo kaj fine de la recenzo la elshutligo. Vi povas klaki ankaŭ ĉi tien: **[Esperanto priamou metódo](#)** aŭ serĉu la ligojn en la paĝo de [Aktualajhoj](#) aŭ [Katalogo- novajhoj](#). Informoj pri la internacia versio kaj kunlaborpropono legeblas ĉi tie: **[Esperanto per rekta metodo](#)** .

Aperis nova numero de IPR

'Goje ni ricevis la 'ci-jaran, unuan numeron de la Internacia Pedagogia Revuo. La belaspekta, zorgeme redaktita revuo donis al ni la ideon: de tempo al tempo alvoki la atenton de la membroj kaj simpatiantoj de la Internacia Laborgrupo "Lingvolan'cilo" al la trezorejoj de la instruado de Esperanto. Jen la enhavo de tiu 'ci numero de IPR:

D-ro **Renato Corsetti** verkis la enkondukan artikolon: **Komenco bona, 'cio bona.**

D-rino **Katalin Kov'ats** konigas la Komunan E'ropan Referenckadron en la artikolo

E'uropan Lingva Dokumentujo por ni esperantistoj.

Sur la pa'goj 6-13 oni povas legi la artikolon de S-ro in'geniero **Leo De Cooman**: **Kiom valoranalizo valoras en pedagogio?** (En la aldona'jo ni publikigas la unuan version de la artikolo.)

La sekvanta artikolo **Eksperimenta ser'co pri lingvaj malfacila'joj** estas verkita fare de

S-ro **Graziano Ricagno.**

La utilecon de Esperanto kiel interleksika studilo skizas la artikolo de **Probal Da'sgupto**:

Esperanto liveras ilaron por leksikokerna esploro.

Sur la pa'goj 18-21 trovi'gas la **Intervjuo kun Detlev Blanke, vicprezidanto de la Scienca**

Komitato de IPR, - la demandaron kompilis D-rino **Katalin Kov'ats.**

Kun granda interesi'go ni legis la artikolon de **G'eza Kurucz**, hungara redaktoro de la

revuo Juna Amiko: **Esperanto en mia vivo.**

Sur la pa'goj 24-26 estas legeblaj la **Bibliografioj de la membroj de la Scienca Komitato**:

Boris Kolker, Aleksandro S. Melnikov kaj Ma'uro La Torre.

La pa'goj 27-33 enhavas la artikolojn **La 40-a Konferenco de ILEI, 11-19 a'ugusto 2007, Ranzan, Japanio, - El la landoj kaj sekcioj...**, - **Lernejoj E-koncerto - projekto de ICK.**

(ICK estas Internacia Centro de la Kulturoj en Krakovo-'Cajovice, Pollando, iniciatita de S-ino **Maria Majerczak.**)

Sur la pa'goj 34-38 ni kortu'site legis la raporton **AKEL2 en Gloucester**, verkitan de gesinjoroj **Ermanno Tarracchini, Valeria Bocchini, Luigia Oberrauch Madella, Vittorio Madella** kaj de la gestudentoj **Fabio, Alessandro, Michael kaj Marco**. Ni forte esperas, ke el la grandioza iniciato **AKEL** de S-ro profesoro **Luís Ladeira** iom post iom elformi'gos tut-e'uropan (eble iam anka'u tutmonda...) movado, la Projekto **Interkultura kaj multlingva dialogo**. Ties alvokon kaj belegan, koloran titolpa'gon (verkon de S-ro **Ermanno Tarracchini**) oni povas jam legi krom Esperanto anka'u en albana, angla, bulgara, finna, franca, germana, greka, hispana, hungara, itala, litova, nederlanda, rumana kaj slovaka versioj sur la hejmpa'go <http://www.edukado.net>, en la rubriko Lingvolernigaj projektoj.

Gratulon al la a'utoroj, kunlaborantoj kaj al la redaktoro de la Internacia Pedagogia Revuo, S-ro **Jozefo N'emeth!**

Kun plej amikaj salutoj

Ludoviko Moln'ar kaj Julinjo Farkas

Pri la abono de Internacia Pedagogia Revuo: informi'gu 'ce S-ro Sjoerd Bosga:
sjoerd@esperanto.se

Esperanto estu la unue lernenda, fremda lingvo kaj kapabloevoluiga lernobjekto en la bazgradaj lernejoj.

Informo de la ĵurnalo The Guardian

Prieduka sekcio de la brita gazeto Guardian anoncas hodiaŭ novan decidon pri fremdlingvoj en Britio:

<http://education.guardian.co.uk/schools/story/0,,2032152,00.html>

[Miaj komentoj trovigas en rektaj krampoj]

Lau tiu decido unu fremdlingvo estos nun devige lernenda de chiu 7-14-jarulo ekde 2010, malgrau avertoj de instruistoj, ke tio apenau eblos, aparte en malgrandaj lernejoj, kie malgranda nombro da instruistoj instruas chion en jam superplena kursaro, [k tri jaroj apenau sufichas por trejni novajn fremdlingvajn instruantojn - k de kiu lingvo?!].

Tiu shlosila decido shajne sekvas el antaunelonga raporto de Lordo Dearing, taskita pri esploro de la tuta lerneja fremdlingva politiko. Oni agnoskas, ke tutmondigo postulas, ke britaj lernejoj havu eblecon lerni fremdlingvojn k restu en kontakto kun ili ghis la fino de la devigaj lernejaj jaroj. [Tio tamen pasintece ne grandnombre okazis, do kial estontece?!]

En 2002 tamen la registaro forprenis de 16-jaruloj la devigon al fremdlingvoj, pro kiu decido komercestroj k Konservativuloj nun ekkaptas la oportunon kritiki la registaron deklarante, ke oni estus devintaj unue prepari la fremdlingvan grundon che la primaraj lernejoj antau ol forigi la devigon che la sekundaraj lernejoj. [La tuta fremdlingva afero shajnas indiki kunflikitaj k malbone elpensitaj planoj, k malmulta sperta scio pri fremdlingvoj - krome oni shajne simple ignoras konsilojn pri kurso pri ghenerala prilingva konsciigo k propedeutika fremdlingvo flanke de Esperantistoj]

Kroma afero - Hay Group [internaciaj konsultspecialistoj pri administrado] anoncis hodiaŭ, ke la neeblo de britaj diplomstudentoj paroli la mandarenan minacas la kapablon de la brita komerco atingi la en 2009 atendatajn vendojn de £200 bil. [miliardoj?] al Chinio. Oni devas, k maleme devos, anstataue rekruti k dungi chinojn kun diplomo

MBA (magistro pri komerca administrado). Nuntempe en Britio nur malpli ol 500 studentoj diplomighas chiujare posedantaj signifan scion pri la mandarena. Hay Group plie alvokas chiujn europajn MBA-kursojn inkluzivi eron pri Chinio por tiel provi malebligi la plian rekrutadon de chinaj MBA-diplomitoj fare de la brita komerco. [!!!]

Amike
Brian
<http://esperanto.memlink.ca>
Brian D.Kaneen <bodokan@telus.net>

Teachers have warned some small primary schools will struggle to meet the government's drive for all children in England to learn a modern language from the age of seven. The National Union of Teachers said the government should carry out an audit of primary schools to discover the staff and training needs required before any changes are made to include modern languages as part of the national curriculum. The union's general secretary, Steve Sinnott, said: "With a limited number of teachers covering all subjects, small primary schools will have their own special problems in introducing a new subject. "Simply requiring schools to deliver and placing them low in the league tables if they don't, is not the answer. Modern foreign languages are far more important than that."

The move to make learning a foreign language compulsory for all seven to 14-year-olds from 2010, announced today by education secretary Alan Johnson, reflects a key recommendation of the report published by Lord Dearing following his review of schools modern languages policy. Lord Dearing recommended that the government should pump an extra £50million a year into helping primary and secondary schools teach modern languages.

The NUT said it was crucial that the initiative was not introduced "on the cheap" and Mr Sinnott spelt out the minimum requirements that every primary school would need. He said: "Alongside training, there will be a need for a fully expert teacher to be available to every primary school. The primary curriculum itself remains hopelessly overloaded."

The UK examination board OCR welcomed Alan Johnson's announcement, but its director of asset languages Barrie Hunt said: "Globalisation demands that as many of our young people as possible have access to language learning. Encouraging schools to keep their students involved to the end of their compulsory education is necessary too." British business leaders and the Conservative party took the opportunity this morning to criticise the government for its decision

in 2002 to remove modern foreign languages from the core subjects which teenagers have to study at GCSE. Lord Dearing's report did not recommend a return to compulsory GCSE in a modern language. However, he said he expected at least 50% of all pupils to continue to study to this level.

The shadow schools minister, Nick Gibb, said: "Dearing's report is attempting to deal with the symptom of the decision to end compulsion to study a foreign language from the age of 14. It does nothing to tackle the underlying causes of the problem. "We welcome the recommendation that languages should be taught in primary schools from the age of seven, but the government should have ensured that this was in place before its decision to downgrade languages at GCSE." The deputy director general of the CBI, John Cridland, welcomed the decision for all seven to 14-year-olds to learn a modern language because it will "embed the skill when it matters most and emulate other European countries where learning languages from an early age is the norm." But he reiterated the CBI's dismay at the government's decision to abolish compulsion for a GCSE in a modern language in 2002. He said: "Lord Dearing's report represents an important step in the right direction - though even when they come into effect in 2010, the plans will take many more years to bear fruit. The significant decline in languages triggered by making languages optional at GCSE is impacting right now."

The comments by the CBI came as research by management consultancy Hay Group published today revealed that the inability of UK graduates to speak Mandarin could threaten the £200billion a year sales to China that British business expects to make by 2009. Lack of language skills in the UK means British companies are planning to recruit graduates from China in order to continue doing business. Hay Group said fewer than 500 students graduate each year in the UK with degrees that have Mandarin as a "substantial" part. Hay Group called on all European MBA courses to include a China module in future in an attempt to prevent any further increase in the recruitment of MBA graduates from China by British business.

Premiero de espero

La Loko fiere prezentas: Espero

Varman bonvenon al la premiero de Espero, la unua esperanta sitkomo en la mondo. La premiero okazos cxe [Overgaden Instituto de Nuntempa Arto](#) en Kopenhago, **sabaton 24 Marto je 17.00**. La saman vesperon, vi ankaux povos

gxoji prelegon de kuratoro Nina Möntmann, kuirajxon de La Loko, kaj gxeneralan festadon je la sonoj de la dj-groupo Dame U Love.

Ni sxategus vidi vin tie!

Olof & Daniel

www.laloko.org

Overgaden Instituto de Nuntempa Arto
Overgaden Neden Vandet 17, Christianshavn, Kopenhago. Estas tre proksime de la metroejo.

Espero estis malavare subtenita de La Dana Administro por Vizuala Arto.

Kio estas EAS - Euxropa Amikeca Seminario

Mi iom kompletigas la informojn donitajn de mia patrino, Carola Antskog, pri tio kio estas EAS. EAS estas Euxropa Amikeco-seminario, do evento dum kiu Euroscola-partoprenantoj de lauxeble plej multaj landoj lernintaj esperanton preparigxas por la enparlamentaja tago kune, interkonatigxas, kune kantas, fortigas sian e-scion. La seminario okazas tuj antaux Euroscola en Strasburgo, en iu tauxga loko, ekz. junulargastejo en kiu la lernantoj povas tranokti. La celo estas ke samtempe venu, al la sama Euroscola-tago (tiaj estas pluraj cxiujare) grupoj (klasoj) kun e-lernantoj de kelkaj landoj (aux cxiuj en la grupo, aux nur kelkaj, inter kiuj tiuj partoprenas en EAS). Eblas ankaux "adopti" anojn de aliaj landoj en iun grupon, sed tio estas iom pli komplike. Do, la baza ideo estas utiligi Euroscolan por kunigi e-lernantoj de kelkaj landoj. Euroscola mem ja ne okazas en esperanto, sed gxi povas servi por utiligi esperanton en la seminario. Krome dum Euroscola, ekz. pauxzoj, oni ja ne havas limigitan lingvoregximon. Lernantoj ja rajtas paroli eon inter si.

EAS okazis kelkfoje, kiomfoje mi ne memoras, do estas iaspeca tradicio jam. Esperantogrupoj

partoprenis en Euroscola unuafoje 2001, sed tiam ankoraux ne estis preparigxa evento nomita EAS.

Amike,
Anna Ritamaki

PS. Carola estas okupita, same kiel mi, cxefe pro la 100-jarigxa jubileo de Esperanto-Asocio de Finnlando. La cxefa festa tago okazos en Helsinko la 28an de aprilo 2007 (je la fondodato,, 100 jarojn poste), kaj somere okazos arta festivalo en la muzikcentro de Kuopio. Aligxilo por la festivalo jam haveblas. Cxiuj estas bonvenaj.

--

Anna Margareta Ritamäki, Brokärrvägen

89/Brokärrintie 89, 25700 Kimito/Kemiö, Finland
+358-2-423146, +358-50-379 3146, fax
+358-2-423246, anna.ritamaki%40kolumbus.fi

Pardonu se vi ricevas cxi tion pluroble pro via membreco en pluraj retlistoj por kiuj cxi tiu anonco povas esti interesa.
Bonvolu disvastigi en viaj informrondoj.

La 40a ILEI Konferenco en Japanio

La 40-a Konferenco de ILEI en Ranzan (Japanio)
11-19 auxgusto 2007

<http://www.ilei.info/novajxoj/Ranzan.php>

* Japanio de proksime - gxia kulturo malfermigxos tuj antaux Viaj okuloj
* Kolegeca etoso en intima rondo
* Kultura kaj ekskursa programo
* Variaj kaj instigaj prelegoj
* Moderkosta logxigo kaj abunda programo
* E-seminarioj kaj agrablaj vesperaj arangxoj
* Festivalo de lingvoj kaj kulturoj
* Simpozio pri la konferenca temo
* Konatigxo kun la mondo de edukado
* Plibonigo de Viaj instrukapabloj

La konferenca temo: VIRINOJ EN ESPERANTO-KULTURO

Kial cxi tiu temo por ILEI-konferenco? Pri ajna evento homoj demandas: "Kial? Kiamaniere?".

La francoj havas cxiam pretan respondon: "Cherchez la femme" (sercxu virinon).
Cxiu esperantisto scias, kiu kreis la internacian lingvon.

Cxi esperantisto scias, kiamaniere gxi disvastigxis. Ankaux cxi-foje la francoj ne maltrafus. Kiu staras cxe la komenco apoge al disvastigo de la internacia lingvo? - Klara Zilbernik! Parto de sxia doto estis uzita por eldono de la Unua libro.

Post sxi venis kulturkreantinoj de Esperanto pri kiuj oni povas multe kaj fiere paroli. Tamen, ne nur ilin celas la konferenca temo, sed ankaux la virinon gxenerale. Pozicio kaj roloj de la virino en la socio kaj la virinaj rajtoj kiel specifa aspekto de la universalaj homaj rajtoj estas gxeneralaj civilizaj demandoj. Kiel la Esperanto-kulturo respondas ilin? Venu al la konferenco, ke ni kune sercxu la respondojn!

Pri la konferenca programo, konferencurbo kaj partoprenkondicxoj legu pli cxe <http://www.ilei.info/novajxoj/Ranzan.php>

Pardonu se vi ricevas cxi tion pluroble pro via membreco en pluraj retlistoj por kiuj cxi tiu anonco povas esti interesa. Bonvolu disvastigi en viaj informrondoj. La 40-a Konferenco de ILEI en Ranzan (Japanio)

11-19 aŭgusto 2007

<http://www.ilei.info/novajxoj/Ranzan.php>

Edukado

Saluton,

La redaktoro de [edukado.net](http://www.edukado.net) informas vin, ke aldonigxis nova ero al la pagxaro. Jen estas kelkaj informoj pri gxi:

Sekcio: Anoncoj

Temo: Lancxita la lingvolanĉilo - Springboard to languages

Anoncanto: redaktoro

[Vidu la anoncon en la pagxaro](#)

Atendas vian viziton la redaktoro de [edukado.net](http://www.edukado.net).

P.s. Se vi ne plu volas ricevi tiun informon, bv. nuligi la mendon en via [profilo](#) sur la hejmpagxo aŭ skribi al la [redaktanto](#).

Konferenco en Kaunas

Estimataj,

mi volas informi Vin, ke la 18-19 de majo 2007 en Kaunas (Litovio) okazos scienca konferenco FIHUSO-2007.

La konferencon arang'as Kaunas Humanisma Fakultato de Vilnius Universitato.

La unuan fojon estas organizata konferenco de c'iuuj katedroj kune, do la konferencon povas partopreni informadikistoj, filologoj, ekonomiistoj k. a., sed en apartaj larg'aj sekcioj.

Scienca komitato por filologia sekcio konsistas el 8 personoj kaj 6 el ili estas famaj esperantistoj: R. Corsetti, H. Tonkin, G. Mattos, A. Dulic'enko, W. Jansen, B. Wacha.

La lingvoj de la konferenco g'is nun certaj estos la litova kaj la angla, sed estas ebleco pri pluaj lingvoj depende de la partoprenantoj.

Se kelkaj esperantistoj partoprenos, tiukaze ec' eblos arang'i apartan esperantlingvan sekcion kaj en la konferencaj aktoj aperigi esperantlingvajn artikolojn. Tio estus antaŭenpas'o en la Fakultato en kiu jam okazas kursoj pri Esperanto kaj kies dekano kaj vicdekanino fieras, ke pere de Esperanto kunlaboras kun alilandaj sciencistoj.

Jen la temoj por filologoj:

1. Strategioj por interpreta legado de literaturaj tekstoj: interfaka aliro;
2. Teksto kaj lingvo;
3. Lingvistiko en interfaka perspektivo: Etno-; Psiko-; Socio-; Inter-; Komputo-, ktp.;
4. Tekstoj en kuntekstoj/Kuntekstoj en tekstoj;
5. Traduk-studoj kiel Interfako.

Pliajn informojn (bedaurinde nur en la angla) Vi povas trovi c'e

http://www.vukhf.lt/?url=/lietuviskas/fakulteto_darbai/konferencijos/fihuso2007

Grava informo: ni estas premantaj c'eforganizanton por duonigi kotizojn.

Vi c'iuuj estas kore invitataj partopreni la konferencon, sendi Viajn artikolojn kaj salutmesag'ojn al dekano de la Fakultato.

Amike kaj bondezire

Aida Cizikaite, De "Aida Cizikaite" <aidute@mail.lt>

Aida Ēipikaitē

Kapiniø 11-15

LT-50189 Kaunas

LIETUVA

tel. +370 37 793408

mob. +370 616 15991

LA AVANTAGXOJ DE URBGXEMELIGXO PER ESPERANTO

Eble ne cxiuj scias, ke en marto 2005 la urbestroj de Herzberg (germana urbeto apud Hanovro) kaj de Gora (Pollando) renkontigxis kaj surbaze de decido de la respektivaj urbaj konsilantaroj- deklaris la du urbojn gxemeligitaj kaj fiksxis ke la reciprokaj oficialaj rilatoj okazos per Esperanto. Al tiu cxi senprecedenca iasence ecx sensacia- rezulto kontribuis la agado de la Esperanto-societo en Herzberg. Ne temas nur pri surpapera decido, cxar ek de la menciita dato la kunlaboro inter Herzberg kaj Gora akiris tre konkretajn formojn. Ekzemple: en somero 2005 la E-societo en Herzberg du semajnojn gastigis kaj trejnxis sep instruistoj el Gora, kiuj poste vastaskale instruis la internacian lingvon en sia urbo. Plej originale estis samjare la dusemajna internacia Arbara Lernejo apud Herzberg, dum kiu arangxo multaj infanoj el ambaux landoj plibonigis sian Esperantan lingvoscion. La sama iniciativo ripetigxos en 2007 kun la partopreno de trideko da gelernantoj kaj geinstruistoj.

Alia aspekto de la gxemeligxo estas la multnombraj kursoj de Esperanto okazantaj en ambaux urboj.

Cxu ne temas pri modelo de internacia kunlaboro, kiun oni devus imiti?

Por pliaj informoj <http://www.ic-herzberg.de>

Esperanto-instruado,	biblioteko,	muzeo	je	via	servo:
Germana	Esperanto-Centro/Interkultura		Centro		Herzberg
D-37412	Herzberg/Harz,	la			Esperanto-urbo
Grubenhagenstr.	6,	Tel:			+49/(0)5521-5983

<http://www.herzberg.de>

<http://ic-herzberg.de>

(kun fotoalbumo)

Nova cirkulero de LINGVOLANCILO

Pasintsemajne tre ver'sajne multaj el inter Vi ricevis la martan numeron de la Revuo Esperanto.

Sur la titolpa'go 'carma, ridetanta knabineto tenas en la manoj la laborkajeron "Springboard to languages" (Saltotabulo al la lingvoj).

La 3-pa'ga, eminenta, bele ilustrita 'cefartikolo verkita de S-ro Paul Gubbins rakontas la esti'gon de la Projekto Lingvolan'cilo en Britio.

La tuta artikolo estas legebla anka'u sur la hejmpa'go <http://www.edukado.net> de D-rino Katalin Kov'ats, en la rubriko **Lingvolernigaj projektoj**.

Nia Internacia Laborgrupo "Lingvolan'cilo" fondi'gis en majo de 2006 por **internacie disvastigi la principon kaj praktikon de la kapabloevoluiga instruado de Esperanto 'ce bazlernejoj.**

La nomon de la Laborgrupo ni ricevis de niaj britaj geamikoj, kun kiuj ni regule tenas kontaktojn jam ekde a'utuno de 2005.

Dankon kaj gratulon al profesorino Angela Tellier, profesoroj Tim Morley, Stephen Thompson kaj 'ciuj membroj de la brita Lingvolan'cilo-ta'cmento!

Kion ni faris 'gis nun por disvastigi la Lingvolan'cilo-programon?

Pasintjare ni ricevis el Britio la tutan instrupaka'jon de la Projekto Lingvolan'cilo, kiun ni prezentas al 'ciuj, interesi'gantaj, hungariaj Esperanto-pedagogoj. Ni verkis artikolon pri la "Saltotabulo"-programo por hungaria gazeto aperanta en 380.000 ekzempleroj.

La hungaria hejmpa'go <http://www.egalite.fw.hu> redaktata de S-ro Istvan Meszaros, nia scienca 'cefkunlaboranto, komencis la publikigon de la 'generalaparto de la brita hejmpa'go <http://www.springboard2languages.org>, - vidu la trikolumnan aldona'jon. S-ro Leo De Cooman pretigis la unuan, trikolumnan, anglan-esperantan-nederlandan version. La aldona'jo bonege montras la pontolingvan funkcion de Esperanto!

Helpe de la paralela legado de la angla originalo kaj 'gia esperantlingva versio preti'gis jam la hungara (Dudich-Molnar), la greka (Georgios Dermatis), la franca (Remy Sproelants kaj Yves Eeckhout) kaj la itala (Ugo Alessandro de Riu) trikolumnaj versioj.

Nia supre menciita hejmpa'go pretas publikigi la trikolumnajn versiojn en 'ciuj e'uropaj lingvoj. En la aldona'jo, (kiu estas modifebla Word-dokumento) oni povas simple anstata'uigi la hungaran tekston per 'ciuj aliaj, nacilingvaj versioj.

Ni da'ure atendas la tradukemulojn!

Nia kara, flandria amiko, S-ro Leo De Cooman jam tradukis esperanten plurajn partojn de la angla springboard-hejmpa'go. Kiel aldona'jon de pluraj, sekvantaj mesa'goj ni sendos al Vi tiujn 'ci traduka'jojn.

Ni disvastigu kune la proponon, ke **Esperanto estu la unue lernenda, fremda lingvo kaj kapabloevoluiga lernobjekto en la bazgradaj lernejoj.**

Kun plej amikaj salutoj
Ludoviko kaj Julinjo

El la leteroj

- Elda Doerfler

<testudo@adriacom.it>

Cxi foje estas mia vico vin danki, cxar la auxoro de la de mi tradukita teksto min kontaktis telefone, por danki mian tradukon. Esti tre agrabla surprizo por mi. Interparolante kun tiu persono, li rakontis al mi, ke liaj gepatroj estis mem esperantistoj en la periodo inter la du mondmilitoj, sekve mi kuragxis al li demandi, cxu li havas ian materialon rilate al la gepatra esperantisteco. Je lia jesa respondo, li tre gxentile mem diris, ke li sercxos inter la postlasitajxoj cxu estas dokumentoj aux io ajn interesa por Triesta Esperanto-Asocio, pri kiu ni estas skribantaj libron celebre de ties cent-jarigxo. Do, danke al vi, kara Bardyl, mi sukcesis kontakti personon kies ekzistadon alimaniere mi ne estus koninta. Plej amike via Elda

- Kun granda intereso mi legis vian sendajhon! Ghi estas chiam ege richenhava!

Mi gratulas al via laboro! Espereble vi ricevis la vintran numeron de BAZARO!

Mi jam preparas la printempan numeron. Mi havas tro multan materialon.

Se mi pensas, ke che la komenco mi ne havis sufichan...kaj nun mi devas elekti, kion mi aperigu, kion ne!

TUTKORE MI SALUTAS VIN, DEZIRANTE BONAN SANON!

Sigmund Julia

Rumanio

- Mi gratulas al via aktivado! Mi petas vin ne sendi la albanan tekston, nur la esperantan!

drino Zsuzsanna Ágnes Berényi

Hungario

- Dankon pro via ofte tre interesa bulteno! Mi deziras al vi kaj cxiuj albanaj esperantistoj . Aparte al vi kara Bardhyl kaj al Shaban Hasani kaj familio.

Mi esperas, ke cxiuj bone fartas. Albanio cxiam restos en mia koro.

Robert Pontnau, Francio

- Dankon por la gravaj kaj agrablaj novajxoj.

Kore,

Geraldo Mattos, Brazilo

- Grandan dankon pro la bulteno, esas tre interesa!
Olha Vdovychenko, Ukrainio

- Kara s-ro Selimi, koran dankon pro via Bulteno. Mi komencis legi. Kiel vi fartas? Mi parolis kun s-ino Häusler, la gvidantino de la tuta amikaro de Bruno

Gröning mondvaste. Mi rakontis, ke vi kaj via edzino interesigxas pri la instruo de Bruno Gröning. Sxi demandis, cxu vi volas farigxi amiko de Bruno Gröning kaj cxu vi sxatus enkondukon en lian instruon. Tio estas nepre necesa, cxar dum la enkonduko vi sentas la Heilstrom, nomita en la germana lingvo. La Heilstrom estas la Dia forto. Per la akceptado de tiu forto, la vivoforto, vi povas akiri vian sanon kaj estas eble, ricevi helpojn en viaj cxiutagaj vivsituacioj. La Heilstrom estas la fluo de Dio mem. Vi ekkonatigxas kun la Diaj legxoj kaj vi lernas akcepti la Heilstrom kaj la gxustajn pensojn. Bv. sciigi al mi, cxu vi kaj via edzino volas la enkondukon en la instruon de Bruno Gröning. Li diris: "Fidu kaj kredu, helpas, sanigas la Dia forto". Mi deziras al vi cxion bonan, kaj mi atendas vian respondon. Dankon.

Edith HENRICI, Germanio

Propagando

Deklaro pri internacia komunikado

Ni, subtenantoj de internacia komunikado:

1. Tre ĝojas pri tio, ke estas pli kaj pli da internacia komunikado en la mondo;
2. Esperas ke la lingva kaj kultura diversecoj en la mondo ne malgrandiĝos;
3. Konsilas praktiki plurlingvismon per interpretado kaj tradukado ĉiam kiam bezonatas kaj praktike kaj finance eblas;
4. Opinions ke gravas subteni plurlingvismon kaj lingvan diversecon, ekz per protektado de minoritataj lingvoj;
5. Pensas ke sistemo por internacia komunikado kiu postulas regadon de pluraj naciaj lingvoj estas elitisma; (1)
6. Spertas ke rekta komunikado (t.e. sen interpretado aŭ tradukado) estas esenca por starigi komunan "ni-senton" inter homoj el malsamaj landoj kaj kulturoj;
7. Bonvenigus pli da forumoj, kontaktejoj kaj kontaktiloj por faciligi rektajn diskutojn kaj debatojn trans la landlimojn;
8. Substrekas ke la angla hodiaŭ estas tre grava kaj utila lingvo por internacia komunikado (2);

9. Supozas ke la angla plu havos tre gravan rolon por internacia komunikado dum la venontaj jardekoj;
10. Rimarkas ke granda nombro da homoj ne sukcesas atingi altan nivelon de la angla malgraŭ multjara lernado kaj penado; (3)
11. Asertas ke esperanto plurkiale estas aparte taŭga lingvo por internacia komunikado (4);
12. Tezas ke modelo en kiu la komunikantoj pasive regus kaj la anglan kaj esperanton kaj aktive regus unu el tiuj lingvoj, estus relative efika kaj justa (kompare kun aliaj modeloj) por internacia rekta komunikado (5);
13. Konscias ke ne eblas trovi modelon por internacia komunikado kiu plaĉas al ĉiuj kaj ke enkonduko de nova modelo postulus multjaran diskutadon, debatadon, esploradon, elprovadon, planadon kaj fine realigadon (unuavice en la edukaj sistemoj);
- 14. Instigas al serioza kaj plurfaka esplorado de la aserto en punkto 11 kaj la tezo en punkto 12.**

- Invitas al ĉiuj kiuj konsentas pri la supraj punktoj subskribi la deklaron.

Aldonaj klarigoj:

(1)
Ĉino, Finno, Koreo, Ruso ks havas realan ŝancon lerni unu el ekzemple la angla, la hispana, la franca kaj la germana. Sed bone lerni du aŭ tri el tiuj lingvoj estas por granda plejmulto simple tro malfacile kaj temporabe.

(2)
"La angla estas uzata kiel oficiala aŭ duon-oficiala lingvo en pli ol 60 landoj, kaj havas elstaran lokon en ankoraŭ 20. Ĝi estas aŭ domina aŭ bone establita en ĉiuj ses kontinentoj. Ĝi estas la ĉefa lingvo de libroj, gazetoj, flughavenoj kaj aviadkontrolado, internacia komerco kaj akademias konferencoj, scienco, teknologio, medicino, diplomatio, sporto, internaciaj konkursoj, popmuziko, kaj reklamado. Pli ol du trionoj de la sciencistoj verkas en la angla. ... Pli ol 50 milionoj da infanoj lernas la anglan kiel aldonan lingvon en la bazlernejo; pli ol 80 milionoj lernas ĝin en la mezlernejo (tiuj ciferoj ekskludas Ĉinion)." [Crystal, Encyclopedia of Language, 1997, p 360.]

(3)
[Kie eblas trovi ciferojn pri tio?]

(4)
Kio igas esperanton aparte taŭga lingvo por internacia komunikado?

i) Ĝi estas pli facila...

Por preskaŭ ĉiuj kiuj lernis kaj esperanton kaj nacian/etnan lingvon, krom sian gepatran, estas klare ke esperanto estas pli facila ol la naciaj/etnaj lingvoj.

ii) Ĝi estas pli neŭtrala...

Ĉar esperanto ne apartenas al iu nacio aŭ popolo, ĝi estas pli neŭtrala ol la naciaj/etnaj lingvoj rilate al internacia komunikado.

iii) Ĝi estas pli justa...

Ĉiuj kiuj lernas esperanton havas bonan ŝancon atingi altan nivelon de ĝi kaj poste, el lingva vidpunkto, pli-malpli samnivele komuniki kun homoj el aliaj landoj kaj kulturoj. (Interese estas ke eblas lerni esperanton kiel plenkreskulo, kaj tamen senti ĝin "sia propra".) Krome esperanto ne "propagandas" iun apartan nacian/etnan kulturon sed "portas" sian propran internacian kulturon.

iv) Ĝi estas pli kost-efika...

Ĉar oni ĝenerale bezonas malpli da tempo por lerni esperanton ol nacian/etnan lingvon, ĝi estas pli kost-efika por internacia komunikado.

v) Ĝi estas pli sukcesa ol aliaj planlingvoj...

La supraj argumentoj iagrade validas ankaŭ por aliaj tiel nomataj planlingvoj, ekzemple Interlingva kaj Ido. Sed esperanto estas en preskaŭ ĉiuj kampoj pli sukcesa ol la aliaj planlingvoj. (Krome esperanto estas malpli eŭropeca ol ekz Interlingva kaj Ido.)

(5)

La angla estas momente tre vaste uzata en multaj kampoj (vidu **) kaj ne estas realisme ekskludi ĝin el la ekvacio de internacia rekta komunikado dum la venontaj jardekoj. Tamen, atingi altan nivelon de skribado kaj parolado en la angla estas por multaj tre malfacila kaj temporaba afero. Sed atingi altan pasivan nivelon en la angla estas pli facile ol atingi samnivelajn aktivajn kapablojn.

Indus esplori alternativajn modelojn por internacia komunikado. Punkto 12 prezentas unu tian modelon.

Aliaj modeloj por internacia rekta komunikado:

- 1) "*Nur la angla (aŭ alia nacia lingvo)*" – pli maljusta ol la modelo en punkto 12
- 2) "*Ĉiuj lernu plurajn fremdajn lingvojn*" – pli elitisma ol la modelo en punkto 12
- 3) "*Esperanto (aŭ alia planlingvo) kiel ĉies dua lingvo*" – tro granda paŝo/ŝanĝo kompare kun la nuna sistemo
- 4) "*Maŝina tradukado solvos ĉion*" – montriĝis malrealisma

Deklaro pri internacia komunikado

1. 'Ciu infano en la Mondo havu la rajton lerni sian gepatran lingvon 'gis la fino de sia 8-a vivojaro.

Ili alproprigu la bazajn kapablojn de parolado, legado, skribado kaj kalkulado en siaj gepatraj lingvoj.

2. 'Ciu infano en la Mondo havu la rajton lerni la ne'utralan pontolingvon Esperanto, kiel la unue lernendan, fremdan lingvon kaj kapabloevoluan lernobjekton en siaj 9-10-11-aj vivojaroj.

3. 'Ciu infano en la mondo havu la rajton komenci en sia 12-a kaj 14-a vivojaroj la lernadon de po unu, libere elektita, fremda, nacia lingvo.

Tiamaniere - helpe de la lernadfaciliga efiko de Esperanto - 'gis la abiturienta ekzameno, 'ciu junulo povus 'spari la tempon de unu laborjaro, kaj povus paroli - almena'u mezgradnivele - tri fremdajn lingvojn. La 'sparitaj tempo kaj mono estus utiligeblaj por evoluigo de aliaj, bezonataj kapabloj.

Nia Laborgrupo en 'ciuj eblaj forumoj alvokas la atenton al la brita hejma'go

<http://www.springboard2languages.org> . Niaj britaj geamikoj ja proponas instrui Esperanton, kiel kapabloevoluan lernobjekton.

Kun plej amikaj salutoj

Ludoviko Moln'ar kaj Julianna Farkas

Hokan skribis:

> Nun mi ĝojus aŭdi vian kritikon!

Kara Hokan,

vi kuraĝe ekentreprenis malfacilan, sed eble necesan taskon. Gratulon pro tio!

Mia impresio pri via deklaro estas, ke:

- via simpla deklaro estas tro longa,

- Punkto 4: jes. Estas absolute necese, ke civitanoj rajtas sin adresi al siaj aŭtoritatoj uzanta sian propran (normigitan) lingvon kaj ke ili ricevas respondon en la sama lingvo.

Ĉiu alia sistemo estas subprema kaj je longa daŭro povas konduki al ribelado aŭ milito.

- ke ĝi provas priskribi nerealigeblan daŭrigblan kunvivadon de sistemo uzanta du lingvojn unu apud la alia. Specialistoj pri lingvodinamiko asertas, ke laŭ 'leĝo' de lingvodinamiko, multlingveco estas malstabila sistemo, kiu necesigas striktajn rimedojn por plu ekzisti. Sen tiuj rimedoj la sistemo aŭtomate evoluas al dominado de la plej forta lingvo. Nu, oni povas diveni, ke lingvo, kiu estas subtenata de potencaj landoj, industrioj, komerco, armeoj, - por ne menciigi koloniismon, imperialismon, perforton, ktp...- estas pli forta ol lingvo de... pacemuloj.

Kaj pri tiuj striktaj rimedoj: ili simple estas nerealigeblaj! Temas nur pri teoria supozo!

Profesoro Grin sufiĉe klare priskribis en sia raporto la diversajn scenarojn kaj la lingvodinamikajn efikojn.

En korespondado kun profesoro Grin (en la franca, ĉar Grin ne estas Esperantisto) mi demandis lian opinion pri unufraza resumo de liaj ideoj pri la rolo de Esperanto, li tre ĝentile iom adaptis mian proponitan frazon al:

"Profesoro Grin ne rekte esprimas preferon por Esperanto, sed montras, ke plurlingvismo povas nur esti stabila per akompanantaj rimedoj, kadre de kiuj Esperanto povus ludi tre utilan rolon."

Cetere se la du lingvoj povus roli kiel internaciaj lingvoj unu apud la alia, la maljustaj privilegioj atribuitaj al denaskaj anglalingvanoj daŭradus. La proponita solvo (precipe en punkto 12) laŭ specialistoj pri lingvodinamiko estas ne nur malstabila (stabiligaj rimedoj estus pure teoriaj sed nerealigeblaj!) sed restas nepre maljusta. Ni ne nur ne akceptu tian solvon sed nepre ne mem proponu ĝin!

La angla ne estas 'projektita' kiel facile lernebla ilo por internacia komunikado. Ĝi estas politike altrudita surogato.

Mia opinie la atingenda kaj proponenda celo por justa kaj daŭrigebla solvo povas esti nur:

- ĉiu homo rajtas uzi sian gepatran lingvon en siaj rilatoj al ... (pri tio jam ekzistas iu deklaro de Unesko, se mi bone memoras, pri 'trilingva solvo': la gepatra, ofte regiona lingvo, la sufiĉe simila sed normigita landa/etna/nacia* lingvo kaj la internacia* lingvo.

- ĉiuj lingvoj havas egalan valoron

- same kiel ĉiu homo nun lerneje lernas sian normigitan lingvon de sia nacio*, ĉiu homo en la mondo havu la rajton kaj la eblojn lerni Esperanton en la baza lernejo kiel unuan fremdlingvon por tiel akiri la eblon (internacie*) egalrajte komuniki kun ĉiu alia homo en la mondo.

* internacie... en Belgio ni havas tri 'oficialajn' lingvojn. Se oni nomas Belgion nacio, la vorto 'nacia' ne taŭgas en ĉi tiu kunteksto, ĉar ni devus ankaŭ ene de tiu 'nacio' povi interparoli per la 'internacia' lingvo. Ĝi eble devus esti 'interetne'. Nu, tio provizore estas detalo.

Mi donas ekzemplon: mi estas flandro (Flandrio estas la norda, nederlandlingva parto de Belgio). Mia gepatra, hejma lingvo estas regiona dialekto de la nederlanda. Mia 'oficiala', normigita lingvo estas la nederlanda, kiun mi lernis en la lernejo. Mia internacia lingvo estas Esperanto.

Mi certe ne volas malkuraĝigi vin! La tasko fari tian tekston estas malfacilega.

Amike salutas
Leo

Esperanto Radio

Karaj Geamikoj!

'Goje ni plusendas la mesa'gon de S-ro Renato Corsetti.

Amike

Ludoviko kaj Julinjo

Bonvolu auskulti la dissendojn de la itala radio en Esperanto! Per tio vi lernos la parolatan Esperanton kaj helpos la pludaŭron de la programo.

Jen intershangho de mesaghoj en internacia listo inter Emilio Cid kaj la redaktanto de la dissendoj de la itala radio:

Emilio Cid skribis:

Gratulon pro via laboro Antonio. Bedaurinde malmultaj esperantistoj auskultas radion.

"Ili ne auskultas radion ĉar ili ne komprenas parolatan esperanton, sed ili ne komprenas parolatan esperanton ĉar ili ne auskultas radion."

Mia konsilo estas, ĉiam provu auskulti radion en Esperanto, eĉ se vi ne kapablas kompreni ĉion. Simple lasu la radio-programon eniri viajn orelojn, sen ia zorgo kompreni. Post kelkaj tagoj vi rimarkos ke vi komencos kompreni preskaŭ ĉion.

La redaktanto de la programoj en Esperanto de la itala radio respondas:

Fakte, temas pri diabla cirklo: oni ne havas kutimon auxdi parolatan esperanton, do oni ne auskultas la radio-elsendojn, pro timo ne kompreni, kaj tial nur tre malofte oni auxdas la parolan lingvon.

Mi povas certigi, ke mi elparolas malrapide kaj bone distingante la vortojn, do ne devus estis nesuperebla baro kompreni la elsendon. Ĉxiukaze, la fakto ke temas pri registrajxo donas la eblecon plurfoje auskulti la saman diron, gxis oni kaptas la plenan signifon.

Do, mi invitas auskulti la italan radion ĉxe

www.international.rai.it/radio/multilingue/presentazioni/esperanto.shtml

kaj skribi:
al la ĝenerala redakcio: [<ondacorta@rai.it>](mailto:ondacorta@rai.it)
al la esperanto-fako: [<trad.esperanto@rai.it>](mailto:trad.esperanto@rai.it)

Korajn salutojn

Antonio De Salvo (RAI - Itala Radio Internacia)

Italiano English Español

22 Febbraio 2007

RAI International online

RADIO



[Americhe](#)
[Australia e Oceania](#)
[Asia](#)
[Africa](#)
[Europa](#)

RADIO

[News](#)
[Programmi](#)
[Onde corte](#)
[Onde medie](#)
[Radio locali](#)
[Hotbird](#)
[Satelradio](#)
[Canali web](#)



PROGRAMMAZIONE IN ESPERANTO UTC 20.00 (Sabate) - ORA ITALIANA 21.00 (Sabato)



[Aŭskultu la plurlingvan
kanalon de Rai Internacia!](#)




[Auskultu la lastajn
programojn en esperanto!](#)

scegli una lingua...

RAI INTERNACIA elsendas el Romo al la mondo Italio estis unu el la unuaj landoj, kiuj iniciatis, en la tridekaj jaroj, la internaciajn elsendojn per kurtaj ondoj. Guglielmo Marconi mem, la inventisto de radio, engagis sin en la starigo en Italio, en Prato Smeraldo apud Romo, de la unua sendilo per kurtaj ondoj. Kvar jarojn pli poste, estis realigitaj du pliaj instalajoj, kaj komencigis la unuaj elsendoj al Norda Ameriko en la angla kaj en la itala. La elsendoj en esperanto komencigis en 1935, okaze de la Universala Kongreso de Esperanto en Romo.

Al la funkcio de komuniko kaj kunligo kun la grandaj komunumoj de la itala migrado aldonigis, en la periodo de la dua mondmilito, tiu politika kaj strategia, en kiu sindevigis ciuj grandaj potencoj, ekde tiuj koloniaj. Post la eniro en la militon fare de Italio, la elsendoj dauris gis la armistico kun la aliancanoj, la 8an de septembro 1943, kaj rekomencigis nur la 3an de septembro 1946. La elsendoj en esperanto rekomencigis en 1950.

Mastrumite de tiucela Informa Servo de la Ministra Konsilantaro, la elsendoj al eksterlando estis konfiditaj per Konvencio al RAI, la publika radiotelevida instanco, per lego de 1962. Kun la paso de la jaroj, la elsendoj perdis la karakteron de oficialeco, kaj kelkfoje de "propagando", kaj farigis fonto de informado, kiu konsideru ciujn komponantojn de Italio respublikana kaj demokrata.



En 1975, la starigo de Direkcio de Gazetaraj Servoj kaj Programoj al Eksterlando metis la bazojn por pli vasta evoluo de la sektoro. Poste, la Servoj al Eksterlando kunfluis, kune kun la novaj interkontinentaj televidaj kanaloj, en Rai Internacia, kiu per plia paso estas destinita transformigi al societo memstara disde RAI.

Elsendoj en esperanto

Nuntempe, Rai Internacia elsendas radiajn informajn programojn en 25 lingvoj, krom en la itala.

La elsendo en esperanto okazas ciun sabaton, je 21.00 laŭ itala horo (20.00 U.T.C./ G.M.T.), laŭ la frekvencoj 6045 kaj 9760 kHz (ondlongoj 49,63 kaj 30,74 metroj).

La programo estas dissendata ankaŭ per la satelito Hot Bird VI, laŭ analogia metodo, de la internacia radia kanalo sur la aŭda subportanto de Raidue (dua kanalo de Rai): polarizado Okcidenta Vertikala 1.446 GHz.

LA GEPATRA LINGVO KAJ ESPERANTO: NEDISIGEBLAJ LINGVAJ RAJTOJ DE CXIU HOMO

"La gepatra lingvo estas kara al cxiu el ni. En la gepatra lingvo ni eldiras niajn unuajn vortojn kaj esprimas niajn pensojn plej bone. Gxi estas la bazo, sur kiu cxiuj homoj disvolvas sian personecon de la momento, kiam ili spiras sian unuan spiron, kaj gxi estas tio, kio subtenas ilin dum iliaj vivoj. Gxi estas la rimedo por lerni respekton al si mem, al sia historio kaj al sia kulturo kaj, cxefe, al aliaj homoj kaj al iliaj diferencoj."

Per cxi tiuj vortoj la gxenerala direktoro de Unesko, Kod'chiro Matsuura, malfermas la cxi-jaran mesagxon por la Tago de Gepatra Lingvo, kiu estas celebrata cxiu-jare la 21-an de februaro. Cxiu parolanto de la internacia, neuxtrala lingvo Esperanto certe aprobas ilin, cxar la parolantoj de Esperanto scias pri lingvaj rajtoj, kaj ilia agado celas protekti tiujn rajtojn cxie en la mondo

rilate al cxiuj lingvoj, grandaj kaj malgrandaj. Neniu lingvo, fakte, estas tro malgranda, por ke oni malatentu kaj mistraktu gxiajn malmultajn parolantojn. Ankaux ili estas homoj samvaloraj kiel ni kaj ankaux ili rajtas je respekto. Ili kulturo ne estas portanto de valoroj malsuperaj al tiuj de aliaj kulturoj, kiuj posedas la rimedojn por altrudi sin al cxiuj.

Al la parolantoj de Esperanto apartenas ankaux la konceptoj, kiujn oni trovas en la deklaro, rilate al la graveco en la nuna mondo de harmonia kombinado inter diverseco kaj identeco, kio en nia kampo signifas kombinadon inter gepatra lingvo kaj aliaj lingvoj bezonataj por komunikado kun aliaj komunumoj proksimaj kaj malproksimaj.

Esperanto estas inter tiuj lingvoj la lingvo por rilatoj internaciaj je regiona kaj monda nivelo. Esperanto ne celas anstatauxigi la naciajn kaj lokajn lingvojn. Tio estu klara al cxiuj. La parolantoj de Esperanto celas protekti cxies lingvon kaj cxies identecon.

Eraras la defendantoj de lokaj lingvoj kontraux sxtataj lingvoj. Ili vidas nur sian problemon, kaj persiste tute ignoras la dangxeron de pli grandaj lingvoj, kiujn ili ecx bonvenigas. Kontraux tiuj ili certe ne povos rezisti en la posta generacio. Esperanto celas defendi ankaux iliajn rajtojn, kiel asertis Zamenhof, kiam li parolis pri la ebla utiligo de Esperanto en plurgentaj regnoj.

Eraras la defendantoj de naciaj grandaj kaj mezgrandaj lingvoj en Euxropo kaj cxie tra la mondo, kiuj vidas nur sian lingvon kaj sian kulturon kaj pensas, ke ili povas sukcesi savi sin mem, ecx se cxiuj aliaj pereos. Ili nur revas resti kiel la dua plej granda lingvo en la mondo. Alianco inter ili kaj la parolantoj de Esperanto estus avantagxa por cxiuj.

Eraras la amas-komunikiloj, kiuj de tempo al tempo atentigas kontraux la ebla forigo de cxiuj lingvoj fare de Esperanto. Ofte ne temas pri eraroj, cxar tiaj akuzoj venas de homoj kaj komunikiloj el landoj, kie oni parolas lingvon deklaritan internacia, kaj kiu grandskale respondecas pri la malapero de lingvoj kaj kulturoj en la mondo nun.

Ni rediru nun tute klare: Esperanto estas nur dua lingvo por kontaktoj inter gentoj de malsamaj lingvoj, cxiu el kiuj rajtas kontribui al la monda kulturo siajn konojn kaj siajn pensojn. En monda skalo nia ricxeco estas nia varieco, sed sen lingvo, kiun cxiu same povas lerni facile kaj pro libera elekto, nur malricxeco kultura kaj unuformeco tutmonda sekvos.

Esperanto ne havas armeon, kiu disvastigas gxin. Esperanto ne havas ekonomiajn interesojn, kiuj devigas homojn lerni gxin. Esperanto ne havas kulturan industrion, kiu volas disvastigi siajn produktojn koste de lokaj alilingvaj produktoj. Esperanto nur havas la forton de racio kaj de justeco, pro kiu cxiam pli multaj homoj libervole elektas gxin por ricxigi sian internacian vivon, por koni

aliajn kulturojn, por kontribui al pli justaj internaciaj rilatoj.

Renato Corsetti
Prezidanto de UEA

Lingvo Lancxilo en Britio, Esperanto revuo

From: Helen Fantom <helen@fantom.org.uk>

To: lingvolancxilo@googlegroups.com

Kaj intertempe la retpaĝo pri la projekto donas multon en la angla.

<http://www.springboard2languages.org>

Enrique wrote:

>
> En la revuo Esperanto de marto 2007 estas
> belega artikolo pri la brita Lingvo Lancxilo.
> Gxi estas legebla (elsxutebla) de
>
> <http://www.edukado.net/pagina/Lingvolernigaj+projektoj/18017//>
> <[>](http://www.edukado.net/pagina/Lingvolernigaj+projektoj/18017//)
>
> Cxu tiu artikolo ekzistas en la angla lingvo?
> Se ne, cxu iu povas traduki gxin al la angla?
>
> Mi kredas ke tiu artikolo estas bonega por
> sendi al jxurnaloj, revuoj, radioj, aux
> por prezentado en lernejo.


>
> Enrique
> Fremont, California, Usono
Por malaboni la grupon, retskribu al lingvolancxilo-unsubscribe@googlegroups.com
Por afisxigi aliajn elektelecojn, vizitu la grupon je adreso
<http://groups.google.fr/group/lingvolancxilo>

<http://www.herzberg.de>

<http://ic-herzberg.de>

(kun fotoalbumo)

(with a photo-album)

Via sincere,  OptionButton1

Yours sincerely,

David Curtis

La preso kaj la medio pri albanoj kaj Albanio

Euxropo ekspektas la naskigxon de nova sxtato

De

The Guardian

Publikigita: februaro 20, 2007

Ian Traynor en Prishtina

Kosovo kaj Monako versxajne ne havas ion komunan. Sed kiamfoje vi telefonas per portebla telefono al Kosovo logxata plejmulte de albanaj etnuloj, en sudorienta Balkanio vi devas uzi la prefikson +377, kiu estas ja tiu de granda ludejlando de milionuloj de Euxropo en la Riviera marbordo de Francio.

Fakte oni estas favoriginta nin, donante sian prefikson- diris al mi la ministro pri medioprotektado kaj spaca planado, Ardian Gjini. –Sed ni jam estas paginta suficxe kare tion. Dekoj da milionoj da euxroj foriras cxuijare de Kosovo, la plej malricxa regiono de nia kontinento je direkto de unu el plej ricxaj princlandoj, nur por ke ni havu apartan landan telefonkodon, disde de tiu se Serbio, nia intima malamiko.

Tio spegulas unu el la problemoj pro kiuj ni ne sentas nin memstara lando. Sed cxi tie ekzistas multe da tiaj.

La kosovanoj kiuj volas vojaĝxi eksterlanden por viziti siajn proksimulojn en Svisio, Germanio ka portas bluan identigdokumenton liverita de UNMIK- Unuigxintaj Nacioj-komiso pri Kosovo. Alian vojaĝxdokumentan ili ne rajtas akiri. Alie, oni devas subacxeti tre kare serban pasporton kontraux 500 euxroj por ke pli libere movigxi en Euxropo.

Kosovo devas havi ankaux sian propran flagon, centran bankon kaj valuton, doganon cxe internacia limo, blazonon, himnon, armeon kaj kontrolon de sia aerspaco.

Do, nova sxtato estas ekspektata naskigxi.-Nature estos pli bone, estas cxiam pli bone ekhavi sian sxtaton-diris Mustafa Blakqorri, albana etnulo reveninta post multaj jaroj el Kolonjo de Germanio. Aktuale cxio cxi tie estas katastrofeca. Sed akirinte la sendependecon ni esperas ke estos pli da laborpostenoj kaj industria progreso.

Neniam ekzistis sxtato je nomo Kosovo. Kaj neniam ekzistis tia situacio dum postkolonia erao.

En Vieno la politikaj kaj diplomaciaj teamoj de Serbio kaj Kosovo renkontigxas plurfoje, sub la gvido de finna eksprezidento Matti Ahtissari. Ili sercxas ian solvon por la estonto de Kosovo, probable pri sia sendependigxo sub ombrelo de EU.

La projekto de Ahtissari ne mencias eksplicite la sendependecon sed gxi enhavas ja gxin, ebligante al serboj logxantaj en Kosovo sufcie multe da spaco por memregeco. Cxio estas pensata kiel ia granda kompromiso. NATO-a fortoj foriros kaj anstatauxigxos de tiuj de EU. Serboj en Kosovo ektimas.

Por Serbio la formulo de Ahtissari estas humiliga, sed la sendependeco de nova lando notas la finon al 15 jara dramo de la eksa Jugoslavio jam ne plu ekzistanta.

El la bultenoj de amikaj E-asocioj

El la bultenoj de amikaj asocioj

Kiuj estis plej grandaj genocidistoj de XX jarcento

Laux statistiko, la nombro de viktimoj kauxzitaj de la plej grandaj genocidistoj de XX jc jenas

:

Vladimir Ilicx Lenin (1917-1924)	4 milionoj
Leopoldo II (1885-1908)	10
Cxangkajsek (1921-1940)	10.2
Adolf Hitler (1933- 1945)	21
Mao Ze Dong	38
Josif Visarianovicx Stalin (1925-1953)	43
Entute	126 milionoj

(Cxerpita el notico de Julia Sigmund, en "Bazaro" nr. 4, 2006)

Raporto pri IFES 2007 en Rumanio

Inter 17 – 23 de februaro 2007 okazis la Internacia Fervojista Esperanto-Skisemajno (IFES) en Azuga – Rumanio.

Partoprenis 23 esperantistaj fervojistoj el 5 landoj: Austrio, Belgio, Danio, Hungario kaj Rumanio.

Organizis la aranghon la prezidantino de la Rumana Esperanto-Fervojista Asocio, s-ino Rodica TODOR, kune kun siaj gekolegoj de Brashovo, Bukureshto kaj Ploieshtj.

Sabate, la 17-an de februaro, ekalvenis la gastoj kaj okazis la interkona vespero.

La duan tagon, dimanche, la partoprenintoj iom promenis tra la urbeto Azuga, bela ripozloko en la Valo de Prahova, situanta inter la montoj, kovrita de chiam verdaj arbaroj.

Oni vizitis la iaman famkonatan fabrikon de champano, RHEIN, funkciantan ekde la jaro 1892, kiu provizigis per champano la regnan familion. Chi tie oni eksciis pri la fabrikadprocezo de la champano kaj, en gaja etoso, oni gustumis la plej altkvalitajn vinojn.

Posttagmeze okazis la skikonkurso, kies gajnintoj estas Silvia PURA-Rumanio kaj Ben INDESTEGE-Belgio. S-ro Martin Stuppnig enmanigis belajn pokalojn donacitajn de la urbestro de sia austria loĝloko kaj de s-ro Johann Geroldinger, "la patro" de IFES.

Sekvis la tradicia karnavalo, dum kiu ni admiris belajn kostumojn de geĉinoj, orienta geedza paro, tataro kaj dancistino en kabareto, kantisto el Meksikio, kowboy, la bendo ABBA k.a. La unuan premion oni atribuis al la fervoraj gekantistoj de ABBA (Gabriella Tibuleac, Rosmarie Macarie, Rodica Kraila, Alexandru Tibuleac) kaj la duan – al la chinino (Eniko Teghiu).

Lundon okazis tuttaga ekskurso en Brashovon, kie, post la vizitado de la urbo, la partoprenintoj renkontis la E-kursanojn, kiuj chiu lundo cheestas kurson por lerni la internacian lingvon en la Kulturdomo "Reduta". Poste, ghis malfrue vespere, en esperanta klubo okazis, en amikeca etoso, babilado... kelkfoje ech ..."krokodilado".

Mardon, dum la dua tuttaga ekskurso, oni vizitis la fortikajhon Rashnov, la Kastelon Bran (kies nomo estas ligita al Drakula) kaj la faman ripozlokon Poiana Brashov, kie en restoracio dakstila (la dakoj estas la prauloj de la rumana popolo) oni gustumis tradician vinon au brandon bojlitajn kun spicajhoj.

Vespere, spite la lacighon, Aurora BUTE kaj Rodica TODOR prezentis al la eksterlandanoj la gastigantan landon Rumanio, geografie, historie kaj per vidindajhoj projekciitaj sur ekranon, imagojn pri la norda Moldavio, la belan Maramuresh – kie la malnovaj tradicioj plej bone konservighis, la mezepokajn urbojn Sighisoara, Sibiu kaj Brashov, la verkojn de la mondfama skulptisto Constantin Brancusi, la chefurbon Bukureshto, la bordon de la Nigra Maro, la Delton de Danubo k.a.

La Valo de Prahova estas vizitinda regiono, kie la turisto ne povas enuighi: oni povas viziti kelkajn ripoz- kaj kuraĉlokojn, proksime situatajn. Oni ne povas eviti Sinaia-n, la somersidejon de la eksregha familio, kies kastelon Pelesh kaj kasteleton Pelishor indas viziti. Ne nur pro siaj historia kaj kultura heredajhoj... sed ankaŭ pro la fakto ke la Reĝino Elisabeta kaj la Princino Maria, kiuj loĝis ĉi tie, forte subtenis ekde la jaro 1907, la instruadon de Esperanto, precipe por blinduloj. Same en Sinaia troviĝas la vilao de George Enescu, fama muzikisto, komponisto kaj violonisto. Tie estas ĉambro, kie loĝis kaj studis Jehudi Menuhin kun sia majstro Enescu. En la fino de la vizitado, en aparta salono, oni auskultis la belan muzikon de la Unua Rapsodio de Enescu. Vespere, s-ro Martin Stuppniĝ prezentis kvin tibetajn ritojn, kiuj helpas al homa sanstato. Ĉiuj partoprenintoj diligente provis la ekzercojn.

Jhaŭde oni skiis en Predeal, alia fama ripozloko, kaj la neskiantoj ekskursis tra la arbaro, sur negha vojeto. Dum la adiaŭa vespero ĉiuj gustumis la jam konatajn rumanajn bieron (bierfabriko troviĝas eĉ en Azuga) aŭ vinon, oni kantis rumanajn kantojn, en bela, amika kaj vere esperantista etoso.

Vendrede la partoprenintoj forlasis la belan urbeton Azuga kaj reveturis hejmen, espereble kun belaj memoroj pri vintra semajno en montara regiono de Rumanio.
Aurora Bute, Timișoara, Rumanio_____

NI kaj ILEI

Estimataj Gesamideanoj! Mi informas vin, ke nia februara elektra gazeto jam legebla estas kune kun la retpaĝa rubriko "Interesajhoj": <http://kiralylajos.extra.hu> Kun elkoraj salutoj:

Adrienne, sinjorino Pásztor

el urbo Miskolc, Hungario



Estu kore salutata sur la hejmpaĝo de
Miskolc urba "Király Lajos" Esperanto Amika Rondo!



Estimataj samideanoj,
Maritza, estrarano pri la regiona agado, petas de mi
raporton pri la E-agado en Balkano.
Mi petas mallonge kaj, se eblas, urghe, sendi al mi
la raportojn por chiu lando, por ke mi kompilu la
finan
version.

Mi petas la raporto ne estu detala, nur 2-3 linioj
pri chiu evento.
Koran antaudankon,
Aurora Bute

P.S. Chu vi konas la retadreson de Samir Ribici? La de
mi konata adreso ne plu validas.

AVE - informoj

+ el Sudafriko:

- 1) La registaro finprilaboras strategion por la enkonduko de biokarburajxoj. Ekzistas riskoj kaj eblecoj por malaltigi elfluigon de karbona dioksido.
 - 2) Nova legxo pri rubajxo preskaux pretas.
 - 3) La urba registaro de Kaburbo (kie mi logxas) baldaux enkondukos novajn regulojn pri la uzado de akvo-sunhejtiloj.
 - 4) Pro granda kresko de nia ekonomio kaj industrio, planoj por novaj elektraĵ centraloj surbaze de karbono bedaŭrinde estas realigataj.
- Amike salutas de la Kabo de Bona Espero, Harro.

+ P.R. Cxinio:

La Tutlanda Popola Kongreso diskutos pri la medio.
La granda ekonomia kresko postulas okupigxi pri tio.
Akvo (pura, kaj suficxa), Aero (pura), Sociala justeco.
Bedaŭrinde la libereco de opinio estas absolute neglektita
(mi ne parolas pri la modo, ktp) - ĵurnalistoj ne rajtas informi gxuste.
Kritiki estas krimo.
La interreto estas barita kontraŭ "malfacilaj" temoj.
Oni planas altigi la militaran bugxeton je 18%.
Almenaŭ en la lando oni plantas arbojn, sed samtempe "rabas" ilin el aliaj landoj.
("rabas", cxar mankas racio pri la ekologiaj bezonoj en Siberio, kaj suda Azio)

+ Usono

Usono militas por havi suficxe da nafto. Komencigxas movigxo por redukti la foruzon de tiaj resusroj. La Demokratoj kaj Verduloj kontraŭas la militon en Irako. La mortpuno ankoraŭ montras rasisman statistikon - nia amiko Sekojo estas unu en tiu vico. Usono kaj Japanio apartenas al (eble estas ?) tiuj alt-evoluitaj sxtatoj, kiuj ankoraŭ ekzekutas tian arhxaikan vengxo-punon.

+ Cxinio, Israelo, Rusio, Usono (k.a.) ne volas malpermesi la kontraŭpersonajn minojn (eksploziletojn); aparte la mult-minaj obusoj (kiuj postlasas milojn da ne-eksplozitaĵoj) restos por la uzado.
Belgio entute malpermesis produkti kaj uzi tiajn armilojn.
Germanio, ankaŭ granda armil-produkt lando, celas al la perfekta armilo, kiu mortigas sole dum la milito - sed tia perfekteco ne eblos.
Tiaj armiloj mortigas aux mutilas ne nur dum - sed longtempe post la milito.

---- suficxas la plorado, restas kelkaj pozitivaj novajxoj (el la Verdaj Partioj) ----
2007-01-21 (EGP-Update flash)

GB: La Verduloj, malgraux minoritato en la urba konsilio, sukcesis, ke Londono elspozos 47 mio GBP (pundoj) por subteni la klimato-savan temon: pli efika uzado de energio en la trafiko (bicikloj, pied-irado, komuna uzado de auxtomobiloj (car sharing), publika trafiko (reuzi la brems-energion de la metroo), hejtado.

2007-03-05 (EGP)

Estonaj Verduloj gajnis 7,1% kaj 6 segxoj en la nacia parlamento. Laux la nomoj la nov-elektitaj devenas el la diversaj etnoj: estona, rusa, latva (?)

2007-02-18 (EGP-Update flash)

Albanaj Verduloj gajnis 10 segxojn en komunumaj elektoj, jam malgranda progreso. Ili plendis, ke la elekto-sistemo ankoraux ne plenumas la euxropan normon.

2007-01-21 (EGP Update flash)

Moldavio: La Ekologia Partio (PEM AVe) manifestaciis antaux la rusa ambasadejo (2006-12-19)

Ili montris la sloganon "Putin, plenumu viajn promesojn !"

Rusio promesis formeti la grandan stokejon de municio en Cobasna kaj retiri la 14-an

Armeon (promesita en Istanbul antaux kelkej jaroj). La potenciala eksplodo de la stokejo kauxzus katastrofon en regiono de 200 km cxirkauxe. Republic of Moldova

and of the ammunition dump from Cobasna.

2007-01-21 (EGP-Update flash)

La cxehxaj Verduloj kunlaboras en la nova koalicia registaro de Cxehxio.

2006-12-20 (EGP-Update)

En Kipro estis elektitaj la urbestro en Peiya kaj pluraj urbo-konsilistoj de La Verda Partio. (laux "Athos Agapitos" <agapitos@cytanet.com.cy>)

Buenos Aires: Federacio de la Amerikaj Verdaj Partioj kunvenis, 2006-12-12/14.

Partoprenis Verdaj Partioj el Argentino (kiuj jxus fondigxis), Brazilo, Dominika Republika, Gujano, Kolombio, Kanado, Cxilio, Meksiko, Nikaragvo, Usono, kaj Catherine Grèze de la Euxropa Verda Partio. El la temoj: nuklea energio, gasdukto, paper-uzinoj je la Rio de la Plata, politika ekologio. (el EVP. Update flash, 2006-12-19)

Azerbajdsxan: (2006-12-16), Baku,
La Verda Partio okazigis fondan asembleon en Baku. Ili elektis Mayis Gulaliyev kaj Tarana Mammadova kiel estraranoj. Post unu monato ili devas fari la formalajxojn por esti akceptota kiel partio. (el EVP. Update flash, 2006-12-19)

Rusio: 2006-12-10, Moskvo,
GROZA partoprenos nacian kongreson pri Homaj Rajtoj en Rusio kune kun aliaj NRO-oj kaj partioj. (Verda Alternativo "Alexei Kozlov" <kozlov-vrn@yandex.ru>)

Bondezirojn,
kaj ne forgesu aligxi al la SAT-kongreso aux al la EEU-Kongreso.

!!!! Dum la UK supozeble ne okazos AVE-kunveno - cxu ? !!!!!

Amike salutas / Mit freundlichen Grüßen
Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE) - sekretario
Manfred Westermayer, Kandelstr. 62, D-79194 Gundelfingen
www.comlink.apc.org/ave/

Internacia Tago de la Virino

De: Johano Dale <jtd368@yahoo.com>
Al: Monda Familio <MondaFamilio@yahoogroups.com>

Samideanoj:

Hieraux estis la Internacia Tago de la Virino, speciala tutmonda okazajxo kreita fare de la Unuigxintaj Nacioj por priatentigi la problemojn de virinoj kaj knabinoj tra la mondo kaj la solvojn al tiuj problemojn.

El la 1.3 bilionoj da malricxuloj en la mondo, 70 procento estas virinoj kaj knabinoj.

Ke ni specife kaj ageme petu al niaj registaroj pliiigi sian kontribuon al la Miljaraj Evoluadaj Celoj, kiuj cxiuj helpas al la plibonigado de la rango de virinoj en la mondo.

Sube, kaj ankaux aparte algluita, estas mallonga prelego fare de la Kanada Ambasadoro al la UN-o je la okazo de la Internacia Tago de la Virino. (Se la suba artikolo aperas al vi sen la Esperantajn supersignojn, iru al la algluita versio.)

Mem-globalizade via,

John Dale
Estrarano de la
Unitariana Universalista Oficejo cxe la Unuigxintaj Nacioj

Kanada Ambasadoro al la UN-o John McNee je Genra Egaleco kaj la Envpovigo de Virinoj (MaximsNews.com, U.N.)

Unuigxintaj Nacioj - / www.MaximsNews.com, UN/ - 07 Marto 2007 –

La sekva prelego de Ambasadoro John McNee, Kanada Daŭra Reprezentanto al la 61-a Sesio de la UN-a Ĝenerala Asembleo, estis prezentita al la neformala tema diskuto pri Genra Egaleco kaj la Envpovigo de Virinoj en Nov-Jorko je Marto 6, 2007.

"La hodiaŭa neformala tema diskuto okazas en la konteksto de la 30-a dat-reveno de la Internacia Tago de la Virino, kaj la gravaj interkonsiliĝoj de la 51-a sesio de la UN-a Komisiono je la Rango de Virinoj.

Ĝis nun, virinoj ankoraŭ ne atingis la egalecon antaŭviditan fare de la Unuigxintaj Nacioj kaj siaj Membro-Ŝtatoj antaŭ 30 jaroj. Virinoj kaj knabinoj ade luktas. El la 1.3 bilionoj da personoj vivantaj en malriĉeco tra la mondo, 70 procento estas virinoj, kaj du-trionoj de la infanoj senigitaj je baza edukado estas knabinoj. Perforto kontraŭ virinoj kaj knabinoj ankaŭ daŭras kiel unu el la plej ĉieaj kaj neagnoskitaj malobeoj de homaj rajtoj.

Ĉi-tiale, la Internacia Komunumo devontigis sin en 2000 al la Miljara Evoluada Celo de genra egaleco kaj la enpovigo de virinoj. Ekde 2000, oni pli kaj pli konsentas, ke ĉiu unuopa Celo rilatas rekte al virinaj rajtoj kaj ke en socioj kie virinoj estas egalaj je viroj ekzistas multe pli bona ŝanco por atingi ĉiujn Miljarajn Evoluadajn Celojn. Kanado, kun la internacia Komunumo, rekonas, ke la Bejĝinga Platformo por Agado kaj la Konvencio je la Elimino de Ĉiuj Formoj de Diskriminacio kontraŭ Virinoj estas la tutmondaj kadroj por atingi tiun ĉi celon.

Kanado subtenas iniciatojn tra la mondo celitajn je plibonigado de la eduko de knabinoj, la ĉesigo de perforto kontraŭ virinoj, kaj la efektivigado de la Konvencio je la Elimino de Ĉiuj Formoj de Diskriminacio kontraŭ Virinoj. Ni certigas, ke koncernoj rilataj al la

egaleco de virinoj kaj viroj, knabinoj kaj knaboj, estas eksplicite kaj sisteme integritaj en ĉiujn niajn preter-bordajn evoluadajn programojn. Kanado kreis kadron por taksu la plenumadon de tiu ĉi celo kaj antaŭenrigardas daŭre dividi spertojn kaj informon pri atingado de rezultoj por egaleco de virinoj kaj viroj, knabinoj kaj knaboj.

La temo de la ĉi-jara Internacia Tago de la Virino, "Ĉesigo de Senpuneco por Perforto" sidas firme en la bazaj valoroj de la nova Kanada registaro kaj memorigas nin pri la daŭra kaj neakceptebla naturo de perforto kontraŭ virinoj kaj knabinoj, kaj pri la laboro kiu restas esti farita por atingi la egalecon de virinoj kaj viroj, knabinoj kaj knaboj kaj la enpovigon de virinoj.

Kanado prenas serioze sian sindevontigon por ĉesigo de ĉiuj formoj de perforto kontraŭ virinoj kaj estas preninta signifajn paŝojn por alfronti demandojn de senpuneco por tiaj krimoj en nia nacia kaj internacia laboro. La antaŭnelonga detala Studo pri Perforto kontraŭ Virinoj fare de la UN-a Sekretaria-Ĝeneralo emfazas la bezonon por politika volo kaj sindevontigo je la plej altaj niveloj por antaŭecigi la preventon de, kaj ĉesigi la senpunecon por, perforto kontraŭ virinoj.

Kanado havas fortan leĝ-farantan kadron por la protekto de virinoj kaj knabinoj disde perforto, inkluzive ĉe-heiman perforton. Aldone, la Registaro de Kanado alfrontas la problemon de ĉe-heimaj perforto kontraŭ virinoj kaj knabinoj per la Familia Perforta Iniciato. Tiu ĉi iniciato agas kontraŭ perforto per programoj de preventado, protektado, kaj kuracado. La registaro ankaŭ dividas la koncernojn de ĉiuj Kanadanoj pri perforto kontraŭ indiĝenaj virinoj kaj prenis konkretajn mezurojn por alfronti la radikajn kialojn de perforto kontraŭ indiĝenaj virinoj kaj knabinoj en siaj hejmoj kaj en la pli vasta komunumo. Oni donis al tiu ĉi afero aldonan kaj pli fokusitan atenton per pliigita fundado al familiaj ŝirmoj en Unua-Naciaj komunumoj kaj per la Iniciato "Fratinoj de Spirito," kiu penas trovi konkretajn solvojn al la problemo de perforto kontraŭ indiĝenaj virinoj en Kanado.

Internacie, Kanado daŭre agemas je la afero de perforto kontraŭ virinoj. De 1994-2005 Kanado estris ĉiujaran rezolucion je la elimino de perforto kontraŭ virinoj ĉe la antaŭa UN-a Komisiono pri Homaj Rajtoj urĝigante al Ŝtatoj preni konkretajn paŝojn por preventi kaj elimini ĉiujn formojn de perforto kontraŭ virinoj kaj knabinoj. Kanado daŭros siajn klopodojn alfronti perforton kontraŭ virinoj en la nove kreita UN-a Konsilantaro pri Homaj Rajtoj.

Kanado nuntempe kompletas sian Agad-Planon por la Efektivigado de UN-a Sekureca Konsilantara Rezolucio 1325 pri Virinoj, Paco, kaj Sekureco.

Tiu ĉi superĉioa, tut-registara Agad-Plano alfrontas la kvar ĉefajn areojn kovritajn fare de Sekureca Konsilantara Rezolucio 1325, inkluzive la bezonon por plena kaj egala partopreno de virinoj en pac-procezoj kaj pac-konstruaj agadoj. La Kanada Agad-Plano ankaŭ emfazas la Kanadan sindevontigon por malpliigi kaj ĉesigi senpunecon por ĉiuj formoj de perforto kontraŭ virinoj kaj knabinoj, inkluzive seksan ekspluaton kaj misuzon. Kanado daŭros siajn klopodojn en tiu ĉi areo por certigi, ke la rajtoj de virinoj kaj knabinoj estos respektataj kaj protektataj.

La hodiaŭa neformala tema diskuto estas okazo por ni por revjui kiom ni estas progresintaj en la lukto por egaleco de virinoj kaj viroj, knabinoj kaj knaboj kaj la enpovigo de virinoj, kaj oportuno por rigardi antaŭen por signifa ŝanĝiĝo." ~~~~~

(tradukita fare de John Dale)

"Estu la sxangxigxo, kiun vi deziras vidi en la mondo." -- Gandhi

Tago de Tibeta Auxtonomio

Antaux 48 jaroj en Tibeto okazis popol-levigxo kontraux la cxina okupado (kiu komencis 1949/50); Mao dse dong argumentis, ke ili liberigis Tibeton de la feuxdalismo. Sed fakte temis pri alpropriigo de grandega lando kun ricxaj resursoj.

Sekvis jaroj de kruela subpremo kaj ekzekutoj. Ecx nun, post malstrecxigo Tibeti kiel cxina provinco ne estas vere auxtonoma. La cxina etno plimultigxas, la malnovaj kvartaloj estas detruataj por stabiligi la situacion.

La politiko de senarbarigo (Tutmondaj Scienco kaj Tekniko, (dulingva) 1996/#3) kaj maltauxga agrikulturo havis postsekvojn de erozio kaj inundoj. En Aveno 26

< <http://www.comlink.apc.org/ave/26/opinio.htm> >

vi trovos pli pri la historio.

En Vikipedio

< <http://de.wikipedia.org/wiki/Tibet> >

vi trovos i.a. la ekzilan flagon kaj ligojn al diversaj lingvoj.

(mi ne kunsendos gxin por ne endangxerigi la cxinajn geamikojn)

La Dalai Lamao cxiam klopodas trovi pacan interkonsenton kun la cxina registaro; sed tiu gxis nun rifuzas, kaj ecx malpermesas lian bildon en Tibeto.

Nun sekvas traduko el la alvoko de Milan Horacek, MEP (membro de la Euxropa Parlamento)* al la Tago de Tibeta Auxtonomio:

"... La tibeta popolo rajtas konservi sian kulturan, religian kaj nacian identecon; kiel konfirmis la Euxropa Parlamento (en Aprilo 2002). Pro tio mi montras la flagon je tiu tago, kaj faros estonte gxis la cxina registaro komencas dialogon samrajtigitan/samnivelan, kiu celas al interpacigxo. Pro tio la Euxropa Unio devas instigi Cxinion al plibonigo de la situacio de la Homaj Rajtoj** kaj komenco de sino-tibeta dialogo - ankaux rilate la ekonomian kunlaboron. La EU povas nomumi specialan senditon pri Tibeto en la komisiono, kiel videbla signalo por la solidareco kun la tibeta popolo. ..."

*) Milan Horacek, MEP, i.a. Sub-komisiono Homaj Rajtoj, renkontigxos kun Sean O'Riain (EEU) por diskuti pri la lingvaj temoj en la EU.

**) Ankaux en aliaj provincoj cxinio subpremas la tendencojn al vera auxtonomio, ekz-e en Orienta Turkeŝtano (XinJiang, Ujgura etno).

Ankaux aliaj sxtatoj subpremas indigxenajn popolojn, pli aux malpli.

La Asocio por la Endangxeritaj Popoloj

< <http://www.gfbv.de> > - kun ligoj al pluraj lingvoj,
informas pri kaj subtenas la klopodojn (re)doni al tiuj la Homajn Rajtojn.

En Esperanto la ĵurnalo de IKEL "Etnismo" informas pri tio.
< www.geocities.com/ikeldv/Etnismo.html >

Amike salutas / Mit freundlichen Grüßen
Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE) - sekretario
Manfred Westermayer, Kandelstr. 62, D-79194 Gundelfingen
www.comlink.apc.org/ave/

Grava speleologia retejo parolas esperante

Italio richas je interesaj naturkavoj, kaj sekve ankaŭ je aktivaj speleologiaj grupoj. Ekde kelkaj jaroj la spleologistoj de Narni, charma urbeto de Umbrio (centra Italio) eldonas belan retejon, kiu antaŭ nelonge ighis internacie konata; laŭ la fama bulteno WCN (Tutmondaj Speleologiaj Novajhoj) ghi rezultis pasintoktobre la unua speleologia ttt-pagaro en la tuta mondo laŭ la nombro de vizitantoj, dum nuntempe estas la dua. La nomo de tiu retejo estas Scintilena (prononcu "shintilena") vorto kiu en la dialekto de Narni signifas acetileno, la hhemiaĵo uzata de grotesploristoj kiel brulajho por lumiloj. Por faciligi la plivastigon de la legantaro, la prizorgantoj de Scintilena decidis aperigi artikolojn en diversj lingvoj, inter kiuj ankaŭ esperanto, danke al la kunlaboro kun la loka esperantista grupo "Paclingvo". Scintilena (www.scintilena.com) ne pritraktas nur grotojn, sed ankaŭ ekologion kaj naturan ekskursadon, kaj felice bonvenigos kontribuajhojn el la tuta mondo pri tiuj temoj. Ni varme invitas ciujn naturamantoj, kaj precipe tiujn kiuj interesighas pri natura esplorado kaj ekskursado, viziti Scintilena-n kaj helpi nin konigi tiun interesan retejon. Pozitivaj reagoj de Esperantio certe estos la plej bona subteno al tiu bela iniciato, kiu donos pluan etan kontribuon al la fruktodona interkomunikado inter eperantistaro kaj tutmondaj naturamantoj.

Gabriel' Aquilina - Grupo "Paclingvo"
gabriele.aquilina@tin.it

AL LA OFICIALIGO DE ESPERANTO EN RUSIO

La 13-an de aprilo 2007 en Rusia Akademio pri Klerigo (Moskvo, Rusio) okazos Internacia konferenco «Propedeŭtika rolo de Esperanto en lernado de fremdaj lingvoj». La aranĝo estas iniciatita de Rusia Ministerio pri Klerigo kaj Scienco post la letero de Eŭropa Jurscienca Universitato Justo (EJU Justo) kaj Rusia Esperantista Unio (REU), kiu enhavis proponon enkonduki Esperanton en studplanojn de rusiaj klerigejoj. La laboron de la konferenco partoprenos elstaraj rusiaj kaj eksterlandaj sciencistoj, Esperanto-instruistoj, esperantistoj, sociagantoj, politikistoj, reprezentantoj de amaskomunikiloj. La laborlingvoj de la aranĝo – la rusa kaj Esperanto. La rezulto de la konferenco fariĝos rezolucio, kiu devos esti la bazo por la decido de la Ministerio rilate studadon de Esperanto en rusiaj klerigejoj.

Por ricevi aldonan informon bonvolu kontakti la Organizkomitaton: prof. Gennadij Ŝilo, rektoro de EJU Justo, tel.: (+ 7 495) 790-34-76; retpoŝto: rectorate@ejusto.ru; prof. Liana Tuĥvatullina, vicrektoro, katedrestro pri internaciaj lingvoj de EJU Justo, tel.: (+7 903) 779-18-91; retpoŝto: admin@ejusto.ru

Samideane,
Prof. Liana Tuĥvatullina,
vic-rektoro de Eŭropa Jurscienca Universitato Justo,
estro de katedro pri internaciaj lingvoj
admin@ejusto.ru

Rakonto

Naun Kule

(cxerpita el la revuo “Muzeqeja”, februaro 2007)

La eksa mia cxefo promenas kun sia hundeto

“Dio mia, savu nin de fegiloj de niaj cxefoj, la ontaj cxefoj de niaj gefiloj”

Nu, nia eksa cxefo promenas, dauxre profumas lauxlonge de trotuaroj disdonante sian patrecan (legu: ruzecan) rideton al la konatoj, vestita “firmece” kaj iranta per sxuoj brillustrite, do iel kasxante sian sepdekjaragxon.

Tutan vivon ja mia cxefo estas promeninta, sed iam lin postsekvis multaj humiluloj kaj malkuragxuloj akompanantaj kaj refresxigantaj lin. Oni diras ke li ofte promenis ankaux kun flirtulinoj per nigraj veturiloj kun fenestroj fermitaj de dikaj kurtenoj aux ludis kaj seksumis kun ili en la komfortaj oficejoj, auxskultante ties jxuradoj favore al li. Sed la flirtulinoj malaperis pro okazintajxoj fluintaj jam, kaj sekve lin sekvas nur sia hundeto.

Povra hundeto! Se gxi ekscius kiun gxi ja postsekvas, kiun gxi gxojigas kaj felicxigas..Kontrauxe gxi tuj eskapus per forkuro kaj aligxus al la cetera hundaro, surprizigante cxi lastan per novajxoj pri sia cxefo. Mirigus ilin la faroj de la cxefo kaj la primokoj de homoj lin konintaj kiomfoje ili renkontis lin surstrate.

Kiun ja primokis ili envere, la hundon aux la ties mastron? Cxu ambaux? Kian kulpon havis la hundo? Pli bone oni esprimu sian koleron al la mastro mem cxiamaniere, ecx per piedfrapo aux pugno lauxdezire, cxar li ja meritis tion! Nur tiel malamece kaj malgaje ne rigardu ilin! Tion la hundo ne povis elteni!

Kiomfoje la okuloj de kelkiu direktigixs al gxi, la hundeto haltigis la iradon, ekbrilis siaj okuloj kaj kosnternigxis kaj pretpretis ataki. Sed la mastro tiris gxin per fersxnureto por protekti gxin de koleremaj piedirantaj. La mastro ne maltrankiligigxas pro la kauxzoj de la konduto de sia hundeto. Kion do li rememoru unuavice, ecx se rememoras ion, al kiu diru tion? Multaj el liaj faroj estas ne rakontindaj! Ecx se vi rakontas pri ili, apenaux trovigxas kelkiu kredanta, cxar ili mirigas ankaux la etulojn..

Sidante en la preferita kafejo, la eksa cxefo sorbas la kafon gxuante kaj orgojlante. Memkontenta de la vivo kaj ridetante kiel bona pacxjo li karesas permane sian hundeton babilante belparole kun gxi tiel amece kiom la povra besto sentas devon rekompenci lin hundede- lekante liajn manojn! La ceteraj klientoj okulsignas unu al la alia. Ilia memoro flugas tre malproksimen..Cxiu havas multon rakonti pri la eksa cxefo, sed malfelicxe nur pri malbonoj.

-Tiu homomangxanto kondutas tiom amece al la besto! Iu filozofo estas dirinta: "Bone koninte la homojn, mi ekamis pli multe la bestojn!" Ne envanas la onidirajxo: diru al mi kun kiu vi sidas, por ke mi malkovru kiu vi ja estas..

Envere mia cxefo estas koninta tre profunde la homojn. Miloj da ili estas enirintaj fingropinte en ties velurajn oficejojn. Kaj cxi tiu auxskultis (aux sxajne auxskultis), trompis, mallauxdis, ofendis tiomgrade ke ili ekploregis kaj indignis. Sed strange denove honorigis la cxefon. La povruloj kredis je li, kredis. Mirego!

Kaj en la sino de tiaj homoj la cxefo sercxis kaj sercxis sian similulon, do lin mem! Sed apenaux li trovis lin! El cxuij homoj kiujn li renkontis ne trovigxis egalulo al si mem. Neniu similis lin en cxion. Nun li aspektis kontenta kaj gaja, sentigxis trankvila, gxentila kaj bonedukita (ecx siaj gefiloj postsekvis liajn spurojn). Li nek mallauxdas, nek minacas, nek enprizonigas kelkiun. Amula kaj prudenta kiel sanktulo!

Tial li havas kialon por promeni, por gxojigxi, por ludi kaj karesi tiom amece la solan amiketon, la hundeton! Sercxis kaj sercxis kaj jen, li trovis sin en la speco de la hundaro! La povra hundeto! Pardonu Dio mia, gxi estas besto kaj ne scias kion fari!

Poemoj de Timo Bushi (Cxerpita el la libro "Ekspekta okulo")

Cxirkauxbrako de la luna cxielo

Mi ne enigxas en la vicon por ekvidi la pasxojn,
Forlasantaj la koton,
En la hxoron de la militaj himnoj, ne plu mi enigxas.
Pli bone mi la kapon alten levas
Por ekenspiri la aeron postlasita de la agloj,
Por ekkisi la kolomban padon,

Por ekkapti la foriran sopiron,
Por ektrovi la ekspektan okulon,
La Lunan cxielon mi ekcxirkabraku.

La poeta tombo

Cxiuj probabloj okazas en la virbova okulo,
Tie ja vekigxas la jugo kun la plugo, tie la Tero diras al la semo, venu,
La Laktovojo tie ekvojugxas, la montaj feinoj sin lavas en la malhelo.
Kiom la virbova okulo vi faru por mi la tombon.

Dio scias kie sin kasxas la doloro

Mi ne trovis do la Terajn blankharojn samkiel la vitberlauxbo,
Nek mi vidis ecx songxante la trian agxon,
La abion nigrigxinta pro senkulpeco de la flamo, kie mi vidu?
Dio ja scias kie sin kasxas la doloro.

La kiso de la fontoakvo

Unu mano,
Glitanta sur la okulkovriloj sekigitaj pro la morto.
La forkapto de la suno.
Embusko de la cxerko,
La malplenigitaj okuloj de la patrino,
La lunsubiro.
La cxiela animo,
En la malfermita duonbusxo de la mortinto,
Kiso de la fontoakvo.
La maro,
Kuracanta la putrigxintajn vundojn de la marbordo,
La patrino.

Balkano

Turnu la kapon al la Balkano malelirinta en okcidenton,
De sur la sputnikoj la tomboj fokusigxas kiel eligitaj okuloj.
Ankoraux la sindromo de trancxitaj kapoj vagas:
Sebrenico-Kosovo kampo kaj reen.
Ne plu sercxu mozaikajxojn sur la Tero,

La koton pripensigas la grizaj kranioj.
Tri ekvinoksoj estas pasintaj ne rimarkinte la krimon,
Tri arbaj histoj estas refarintaj la statuon de la perdintoj.

Sentitole

La balkananoj, fininte la mordadon de sia lango,
Ili mordas la najbaran langon.
Kaj morgaux kian lingvo ili parolos?

En la sangaj spuroj sekigitaj pro la suno la korvoj knaras,
Trans la kulisoj, tie kie mankas la aero estas pecoj da krikrioj,
Korvoj..la solaj salutantaj.

La sangaj makuloj estas la dolora okulo,
La rigardoj disxirigxas..
Ekbruligxas la kandeloj de la dankemo.

Du turoj, du lunaj belecoj Parizo-Pizo,
Por ke montru la cxarmon unu al la alia,
Prenas la homajn okulojn.

La lasta estas nokto forlasanta la tombejon,
Se ne estus la floroj..
En statuon gxi fandigxus nigrece. **Timo Bushi**

balkano) Ni iru antau'en!

Nikov <lasto11@yahoo.co.uk> to balkano, albanaj-
espera., esperanto-rs, bulgaraj-esper.

Estimataj Gesamideanoj,
UPIEK,Sofio ne povus per mono helpi Eo Movadon, char Ni mem ne posedas. Ankau' Ni ne povus fari komercon, sed Ni estas pretaj helpi senpage, chiu, kiuj volas komercii kun Bulgario, au', chiu, kiuj volus veni plibonigi sian sanon en Bulgario. Vi chuij scias, ke en Bulgario ankoraŭ estas kuracistoj kaj kuraĵlokoj, kiuj estas mondspertaj kaj la prezoj estas multfoje malaltaj. Bulgario estas riĉa je balneosanatorioj, minerala akvo kaj kuraĵlokoj, kie uzas la plej novajn metodojn kuraci sen medikamentoj - per ekoprojektoj. Sen Nia helpo Vi povus viziti SPA-centrojn je la diversaj hoteloj. Ni povus helpi Vin trovi la plej malmultekostajn kaj la plej bonajn por Viaj malsanoj. Via danko povus esti Eajn librojn au' gazetojn kaj revuojn po Nia biblioteko au' por Nacia biblioteko. Ni havas adresojn de Malgrandaj kaj Mezgrandaj entreprenoj kaj komercistoj el Bulgario, Romanio, Macedonio, Turkio kaj Greklando.

Korajn Salutoj!
Lasto Nikov,
UPIEK,Sofio - 1000,
P.K. 497
+359 899882261 - portebla kaj +359 2 983 5084

